

Propran koncepton pri lingvo mi havas jam delonge, kaj mi ĝin nun aplikas al Esperanto, ĉar miaj ideoj klarigas pli bone kaj pli facile la plurajn aspektojn de la lingvoj, kiuj estas absolute identaj en la menso kaj ege diferencaj tra la lipoj. Al tiuj ideoj min portas la penso, ke lingvo devas esti io ege facila, ĉar ĝi estas perfekte lernata sen instruo, sed penige instruata pro la nescio de ĝia interna organizo, krom la forta baro de ĉiu unua lingvo jam plene posedata.

Kvankam ĉi tiu parto estas grava kaj post ĝi mi ne plu volos argumenti por miaj lingvaj opinioj ene de mia intencata gramatiko de Esperanto, mi tamen esperas, ke miaj lingvaj ideoj, kvankam aplikataj ĉi tie nur al Esperanto, servos ankaŭ por la klarigo de la fenomenoj de aliaj lingvoj, kiujn certe korpigas la samaj reguloj.

Se trijara infano jam konas ĉiujn bazajn strukturojn de la gramatiko de la gepatra lingvo [la pruvo estas mia filo Viktor, naskita en 2004.02.19, kaj ĉiu samaĝa infano de la mondo], tio estas sufiĉa pruvo de tio, ke lingvo estas facila instrumento kaj ĝiaj malmultaj reguloj devas validi tutegale inter la vortero [morfemo], minimuma sencohava elemento, kaj la frazo, kies ripetado produktas la tekston:

Sono estas rigida sinsekvo da soneroj kaj unuo de la morfemoj.

Morfemo estas rigida sinsekvo da sonoj kaj unuo de la vorto.

Vorto estas aro da morfemoj kaj unuo de la lokucio, krom unuo de la lingvo.

Lokucio estas aro da vortoj kaj unuo de la sentenco: aro da vortoj.

Sentenco estas aro da lokucioj kaj unuo de la frazo: aro da aro da vortoj.

Frazo estas aro da sentencoj kaj unuo de la teksto: aro da aro da aro da vortoj.

Tiuj ses sinsekvaj lingvoformoj estas niveloj kaj apartenas al du grupoj per siaj diversaj konsistoj:

1. La sono, la morfemo kaj la vorto estigas la unuan grupon, ĉar ili havas striktajn limojn en konstanta sinsekvo.

2. La vorto, la lokucio, la sentenco kaj la frazo apartenas al la dua grupo, ĉar ĉiu el iliaj elementoj povas esti ŝanĝata por alia, dum la restantaj plu tenas siajn sencojn.

La lastaj kvar niveloj, elementoj de la dua grupo, provokas la aperon de kvar sxtupoj: la ŝtupo de la vorto, la ŝtupo de la lokucio, la ŝtupo de la sentenco kaj la ŝtupo de la frazo. La sonoj estas la planko de la morfemoj, kaj la morfemoj la planko de la vortoj: plankoj povas aperi en diversaj niveloj, sed mem ne estas ŝtupoj.

La vorto estas la plej valora elemento de la lingvo, ĉar ĝi havas samtempe la facilecon de la sinsekvo kaj la elastecon de la frazo.

La facileco de la lingvo devenas de la granda ripetiĝo de ĝiaj reguloj kun la solaj diferencoj inter la du grupoj. Efektive, se frazo estas strukturo kaj estas strukturoj ankaŭ sentenco, lokucio kaj vorto, la reguloj de la unua devas egale validi por la aliaj. Sekve de tio, se frazo povas aperi subordigita al sentenco, al lokucio, al vorto kaj al morfemo, kial sentenco, lokucio kaj vorto ne povus esti egale subordigita al morfemo? La facileco de la lingvoj kuŝas ĝuste en tio, ke ĉio validas por ĉiu ilia parto en la sama maniero, sed tion bedaŭrinde niaj gramatikistoj ne emas percepti... Kaj tian lingvan senkomplikecon mi celas pruvi, ordinare per ekzemploj de la Ekzercaro de nia Fundamento de

Esperanto, kiel mia pacienca geleganto povos vidi jam en ĉi tiu kvazaŭa antaŭparolo de mia Gramatiko Moderna de Esperanto, kiu obeos al ĉiuj ĉi tie skeme prezentataj reguloj.

Lingvo havas la celon transformi penson de homo en parolon por atingi alian kaj ekhavi de tiu tion, kion la parolanto deziras. Se tio estas vera, la esenca funkcio de lingvo estas reveli tion, kion unu volas de alia aŭ de si mem, kaj tute ne divenigi tion. Sekve de tio, la analizo de lingvo devas konsideri la rilatojn inter la diversaj elementoj sub la prismo de rivelado, kiu havas du kontraŭajn eblecojn: unu elemento rivelas la alian kaj unu elemento ne rivelas la alian.

Inter du elementoj povas okazi unu el ĉi tiuj rilatoj:

### 1. Dependeco:

Dependeco estas la rilato, en kiu unu elemento rivelas la alian, kiu tamen ne rivelas la unuan. Ĝi estas neinvertigebla:

$A / B$  [A rivelas B, sed ne inverse]

$A \setminus B$  [A ne rivelas B, sed ne inverse: A estas rivelata de B]

### 2. Interdependeco:

Interdependeco estas la rilato, en kiu ĉiu el la elementoj rivelas la alian, kaj ne gravas, kiu el ili estas la unua. Ĝi estas invertigebla:

$A // B$  [A rivelas B kaj inverse: A kaj B sin interrilas]

$B // A$  [B rivelas A kaj inverse: B kaj A sin interrilas]

La sinsekvo de la interdependaj elementoj dependas de la temo, kiun ni traktas:

1. Se ni laboras super la semantiko, pli bone estas proponi la sekvantan ordon: signifato interdependas kun signifato.

2. Se ni laboras super la gramatiko, pli bone estas proponi la inversan ordon: signifato interdependas kun signifato.

### 3. Sendependeco:

Sendependeco estas la rilato, en kiu neniu el la elementoj rivelas la alian, kaj ĉiu sinsekvo da elementoj estas unika:

$A \setminus\setminus B$  [A ne rivelas B, kaj inverse: A kaj B sin ne interrilas]

$B \setminus\setminus A$  [B ne rivelas A, kaj inverse: B kaj A sin ne interrilas]

La rilatoj de dependeco, interdependeco kaj sendependeco aperas ne nur inter la elementoj de la lingvoj, sed en multaj aliaj cirkonstancoj de nia vivo kaj de nia mondo: familio estas aro da rilatoj, sed estas eksteraj rilatoj.

Plej oftaj estas duopaj rilatoj:

Inter adjektivo kaj substantivo estas demaldekstra dependeco:

- Se estas adjektivo, estas substantivo, sed ne inverse.

Inter kuzo kaj frato estas demaldekstra dependeco:

- Se estas kuzo, estas frato, sed ne inverse.

Inter suno kaj varmo estas demaldekstra dependeco:

- Se estas suno, estas varmo, sed ne inverse.

Inter filo kaj frato estas dedekstra dependeco:

- Se estas frato, estas filo, sed ne inverse.

Inter virino kaj jupo estas dedekstra dependeco:

- Se estas jupo, estas virino, sed ne inverse.

Inter signifanto kaj signifato estas interdependeco:

- Se estas signifanto, estas signifato, kaj inverse.

Inter patro kaj filo estas interdependeco:

- Se estas patro, estas filo, kaj inverse.

Inter unua kaj lasta estas interdependeco:

- Se estas unua, estas lasta, kaj inverse.

Inter la silaboj de vorto estas sendependeco:

- Neniu el la silaboj rivelas la alian.

Inter filo kaj filo estas sendependeco:

- Se estas unu filo, ne tial estas alia, kaj inverse.

Inter libro kaj libro estas sendependeco:

- Se estas unu libro, ne tial estas alia, kaj inverse.

Kaj maloftaj estas triopaj rilatoj:

Inter infano kaj gepatroj estas interdependeco:

- Se estas infano, estas gepatroj, kaj inverse.

Inter subjekto kaj objekto kaj transira verbo estas interdependeco:

- Se estas subjekto kaj objekto, estas transira verbo, kaj inverse.

Esperanto tamen havas du triopigajn adjektivojn, kiuj havas grandan moviĝemon laŭ la longo de la diraĵo, sed la unua ordinare antaŭas sian duopon kaj la dua ĝin postas:

ĉiuj		tiuj		instruistoj	tiuj		instruistoj		mem
		Vorto	/	Vorto	Vorto	/	Vorto		
Vorto	/	Duopo			Duopo		/	Vorto	
Triopo					Triopo				

Ilia moviĝemo estas facile rekonata:

Tiuj instruistoj laboras ĉiuj en la sama lernejo.

Tiuj instruistoj faras mem la korekton de la ekzercoj.

Ilia senco estas negativa:

Tiuj instruistoj, kaj ne parto da ili, laboras en la sama lernejo.

Tiuj instruistoj, kaj ne aliaj, faras la korekton de la ekzercoj.

La kolektiva montra vorto *ĉiu* baras la ĉeeston de la identiga montra vorto *la* pro sia senco, kiu per si mem subkomprenas tiun de la barata.

Egalan konduton havas la vorto *ambaŭ*. Ĝi estas simpla sinonimo de la esprimo *ĉiuj du* [Ekzercaro]:

Ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili.

Ĉiuj tiuj rilatoj [kaj ne parto da ili] aperas ene de la lingvoj, kiel ni jam vidis supre, sed plej gravaj estas la diadikaj:

Inter konsonanto kaj vokalo estas demaldekstra dependeco:

- Se estas konsonanto, estas vokalo, sed ne inverse.

Inter vokalo kaj konsonanto estas dedekstra dependeco:

- Se estas konsonanto, estas vokalo, sed ne inverse.

Inter signifanto kaj signifato estas interdependeco:

- Se estas signifanto, estas signifato, kaj inverse.

Inter silabo kaj silabo de vorto estas sendependeco:

- Se estas unu silabo, ne tial estas alia, kaj inverse.

Escepte de la rilato de interdependeco, kiu tenas egalaj siajn formojn ĉe la inversigo de la elementoj kaj estas do dusencuma, kaj diference de la aritmetikaj reguloj pri multobligo, la interŝanĝo de la pozicioj de la elementoj de la dependeco kaj de la sendependeco produktas aliajn formojn aŭ estigas absurdojn:

Ĝusta sendependeco:	a \ k \ t \ o [akto]
Alia sendependeco:	k \ a \ t \ o [kato]
Alia sendependeco:	k \ o \ t \ a [kota]
Alia sendependeco:	o \ k \ t \ a [okta]
Alia sendependeco:	t \ a \ k \ o [tako]
Absurda sendependeco:	k \ t \ a \ o [ktao]
Ĝusta dependeco:	jupo / virino [se estas jupo, estas virino]
Absurda dependeco:	virino / jupo [se estas virino, estas jupo]
Ĝusta dependeco:	saĝa homo / trovas [subjekto / verbo]
Alia dependeco:	trovas \ saĝa homo [verbo \ predikativo]
Absurda dependeco:	homo / amikon [subjekto / objekton]

Se tamen inter du sekvantaj formoj aperas la nula varianto [ø] de ordinare antaŭa verbo aŭ alia vorto, tio estigas du dependecojn kaj sekve du esprimojn, sed ofte okazas la forigo de io per elipso por eviti la tedan ripetiĝon de jam dirita vorto. Ĉi-okaze:

Studento serĉas kolegon kaj homo [ø] amikon.

Lingvaj formoj havas po unu sola esenca elemento, kies foresto estingas la tutan formon, kaj akcidentajn elementojn, kies malapero ne ĝenas la formon. Ili estas produktataj per la sekvantaj rilatoj:

1. Dependeco produktas strukturon, en kiu ĉiam aperas unu esenca elemento, eventuale la sola, sed plej ofte ankaŭ unu elemento akcidenta:

Strukturo de sonoj produktas silabon:

m / a [ma: akcidenta kaj esenca elementoj].

Strukturo de vorteroj produktas vorton:

hom \ o [homo: esenca kaj akcidenta elementoj].

Strukturo de vortoj produktas lokucion:

brava / homo [brava homo: akcidenta kaj esenca elementoj].

Strukturo de lokucioj produktas sentencon:

brava homo / ne timas [brava homo ne timas: akcidenta kaj esenca elementoj].

Strukturo de sentencoj produktas frazon:

brava homo ne timas \ spite de danĝero [brava homo ne timas spite de danĝero: esenca kaj akcidenta elementoj].

La supra frazo havas ja du sentencojn, kvankam kelkaj el miaj gelegantoj tion ne kredas, ĉar ili opinias, ke tiuj tri vortoj estas simpla parto, kiu dependas de la verbo kaj do estas alia lokucio, ne alia sentenco. Ili tamen estas alia sentenco, kaj estas facila rimedo por distingi akcidentan sentencon de akcidenta lokucio, ĉar la akcidenta sentenco ĝuas preskaŭ senliman liberan lokiĝon koncerne la lokuciojn de la esenca sentenco [ĉi-okaze, du lokucioj: 1. brava homo. 2. ne timas]:

spite de danĝero / brava homo ne timas  
brava homo \ spite de danĝero / ne timas  
brava homo ne timas \ spite de danĝero

Kaj ĝuste pro tio, la ne facile analizata vokativo [ĉi-okaze: mia filo] estas simpla akcidenta sentenco ligita al la esenca ene de frazo [la punkto markas kunrilaton]:

mia filo / brava homo ne timas \ spite de danĝero  
brava homo \ mia filo / ne timas \ spite de danĝero  
brava homo ne timas \ mia filo . spite de danĝero  
brava homo ne timas \ spite de danĝero . mia filo

2. Sendependeco aperigas fiksan vicigon, kiu produktas konstruon kaj povas havi pli ol unu elementon, sed neniu el ili estas esenca en sia aro:

Vicigo de soneroj produktas sonon [du strekoj: distinga sono]:

1. la soneroj kordovibra, naza kaj lipa produktas la sonon /m/.
2. la soneroj kordovibra, malalta kaj antaŭa produktas la sonon /a/.
3. la soneroj nekordovibra, nenaza kaj lipa produktas la sonon /p/.
4. la soneroj kordovibra, mezalta kaj malantaŭa produktas la sonon /o/.

Vicigo de sonoj produktas vorteron [morfemon]:

la sono /i/ kaj la sono /g/ produktas la vorteron /ig/.

Vicigo de silaboj produktas vorton:

la silabo /ma/ kaj la silabo /po/ produktas la vorton /mapo/.

Vicigo de frazoj produktas tekston [Zamenhof]:

Mi prezentas al mi kian vizaĝon vi faros post la ricevo de mia letero. Vi rigardos la subskribon kaj ekkrios: “ĉu li perdis la saĝon?! Je kia lingvo li skribis? Kion signifas la folieto, kiun li aldonis al sia letero?” Trankviliĝu, mia kara! Mia saĝo, kiel mi almenaŭ kredas, estas tute en ordo.

3. Sendependeco aperigas moveblan vicigon, kiu produktas samordigon, nome kunordigon kaj alordigon [apozicio].

La vicigo de samklasaj lingveroj ne ŝanĝas la funkcion de iliaj unuoj [por la unua, Zamenhof]:

Kunordigo: en la mondon venis nova sento  
 + tra la mondo iras forta voko  
 + perflugiloj de facila vento nun de loko flugu ĝi al loko.  
 Alordigo: ludoviko  
 = mia unua filo.

La movebleco ne tuŝus iliajn sencojn: la unua linio de la supra kunordigo povus esti la lasta, kvankam verŝajne la kunordigo transformiĝus en alordigon, kaj la du linioj de la alordigo povus esti simple inversigataj, kvankam denove aperus alia analizo: predikativa funkcio.

Lingvoformoj povas esti nur lingvaj strukturoj, kiel la silabo, kaj nur lingvaj konstruoj, kiel fiksjaj kaj moveblaj vicigoj, kiuj ne havas esencan elementon kaj do distingiĝas de aliaj nur per la sinsekvo. Estas tamen aliaj lingvoformoj, kies sonĉenoj estas farataj samtempe per konstruoj kaj strukturoj depende de la analiza vidpunkto:

vor	\ \	ta	\ \	ro	vortaro: konstruo per silaboj
A		B		C	
vort		ar		o	vortaro: strukturo per vorteroj
A	/	B	\	C	[morfemoj]

Kiam mi rekonis tion en ĉambro de la Federacia Universitato de Paranao komence de Marto 1967, mi diris al Eurico Back (1923-2003), mia eksprofesoro en la universitata kurso pri latinidaj lingvoj kaj tiama kunexploranto pri la portugala lingvo:

- Eurico, se tio estas konstruo kaj strukturo, kaj samtempe unu sola formo, tio vere estas konstrukturo!...

Kaj mi ege ĝojis, ke mi kreis novan vorton per amalgamo, sed tuj poste mi disreŝiĝis, ĉar la vortaroj ĝin registras kreita inter 1817 kaj 1819 kun la senco de konstrumaniero... Mi tamen donis al ĝi alian sencan, sed tio estas nur eta konsolo!...

Per tio ni distanciĝis de K. L. Pike (1912-2000) kaj de lia Tagmemiko, kies konstruo kaj strukturo aperas en diversaj niveloj, dum ambaŭ dividas la saman nivelon ĉe la nuna nia, kaj samtempe ni tiam gravediĝis je nia Konstruktura Gramatiko de la Portugala Lingvo, kiu naskiĝis kvin jarojn poste (S. Paulo: FTD, 1972. 872 paĝoj.).

## GRAMATIKA PROCEDURO

Lingvo havas du gravajn sencohavajn procedurojn, kiuj distingiĝas per la transpaso de unu elemento al alia en la sama nivelo per la horizontala proceduro, jen kun ŝanĝo de nivelo [kohero], jen sen ŝanĝo de nivelo [samordigo], kaj per la transpaso de elemento de unu nivelo al alia per vertikala proceduro, sekve kun nepra ŝanĝo de nivelo.

Tiuj du proceduroj enhavas la tutan sistemon de ĉiuj lingvoj de la mondo, ĉar ilin postulas la esenca kondiĉo de lingvo, kiu estas la artikulacio.

Tiuj proceduroj provokas la aperon de kvar apartaj procedoj, kiuj sin distingas per iliaj movoj:


1. unu ero plus alia ero, kiuj restas unu sola ero [V + V = V]: samordigo.
2. unu ero plus alia ero, kiuj ekestas aro [V / V = L]: kohero.

3. unu ero, kiu ekestas superero [L > S]: superordigo.
4. unu ero, kiu ekestas subero [S > L]: subordigo.

La unuaj du linioj apartenas al la horizontalaj proceduroj, ĉar ĉiu el ili montras la sinsekvon de unu post alia, kvankam la konsistigo de iliaj rezultoj estas diversa. La du lastaj apartenas al la vertikalaj proceduroj, ĉar ĉiu el ili sin delokas de la origina nivelo al alia jen supra, per superordigo, jen malsupra, per subordigo.

Ŝajnas tamen al mi evidente, ke nur la kohero estas la esenca kaj deviga procedo, kiun lingvo ne povas malhavi, ĉar ĝi estas la esence grava distingilo inter la homa dialogo kaj la besta.

Ilin ni povas videbligi en la sekvanta diagramo:



Ĉiu el tiuj proceduroj havas grupeton da vorteroj kaj vortoj, kiuj distingiĝas per tio, ke ili nepre devas okupi la unuan lokon de la aro, al kiu ili ligiĝas. Mi donas al ili ĝeneralan nomon: prepozicio. Anstataŭ prepozicioj, sed kun la sama funkcio, kelkaj lingvoj havas postpoziciojn.

Ili povas aparteni al unu el kvar subklasoj:

1. Radika prepozicio [funkcio: radikilo], kiu antaŭas radikon kaj okupas la unuan pozicion de vorto, tradicie nomata prefikso. Baza morfemo: *mal*.

2. Kuniga prepozicio [funkcio: kunigilo], kiu adicias morfemon al morfemo, vorton al vorto, lokucion al lokucio, sentencon al sentenco kaj frazon al frazo, tradicie nomata [kunordiga] konjunkcio. Baza vorto: *kaj*.

3. Aliga prepozicio [funkcio: aligilo], kiu antaŭas lokucion, ĝin adicias al la esenca lokucio kaj esence indikas la originon, la vojon kaj la destinon de kargo, tradicie nomata prepozicio. Baza vorto: *de*.

4. Subiga prepozicio [funkcio: subigilo], kiu antaŭas frazon kaj markas ĝian desupriĝon al la malpli altaj niveloj de sentenco, lokucio, vorto kaj morfemo, tradicie nomata subordiga konjunkcio en etnolingvoj kaj subjunkcio en Esperanto. Baza vorto: *ke*.

Estas subigaj prepozicioj, kiuj kombinas en unu sola vorto komplementon de antaŭa predikato kaj subordigan vorton de la sekvanta subfrazo [subordigita frazo]. Mi ekzemplas mem:

apenaŭ	- ĝuste [komplemento] kiam [subordiga adverbo]
dum	- ĉiutempe [komplemento] kiam [subordiga adverbo]
ĉar	- pro tio [komplemento], ke [subjunkcio]
kvankam	- ne pro tio [komplemento], ke [subjunkcio] ne

sonĝu	apenaŭ		vi ekdormos
sonĝu	ĝuste	kiam	vi ekdormos

legu	dum		mi skribos
legu	ĉiutempe	kiam	mi skribos

venu	ĉar		estis invito
venu	pro tio	ke	estis invito

ne iru	kvankam		estis invito
ne iru	ne pro tio	ke ne	estis invito

Kaj mi volas antaŭdefendi min de tio, ke la vorto *la* devus esti unu el la supraj prepozicioj. Tiu vorto ne estas prepozicio pro tio, ke ne ĉiam ĝi staras en la unua loko, kaj mi tion pravas per la antaŭlasta verso de la sesa strofo de la poemo *Preĝo sub la Verda Standardo*, kiun verson Zamenhof ne citis en la Universala Kongreso de Bulonjo-sur-Marco, kiam li parolis al sia popolo la unuan fojon:

Al frata la celo ni iru obstine [...]

## HORIZONTALA PROCEDURO

Kohero kaj samordigo (kunordigo kaj alordigo) estas la du horizontalaj proceduroj. Ambaŭ laboras inter la nivelo de la morfemo ĝis tiu de la frazo.

## KOHERO

Strukturo en konstrukturo estas ĉiam produktata per kohero de esenca elemento, kiu funkcias kiel suno, kaj de akcidenta elemento, kiu funkcias kiel planedo: ĝi estas horizontala proceduro de altiro kaj en ĉiu ŝtupo estas nomo por la esenca elemento kaj nomo por la akcidenta, kiu povas esti jen deviga, jen nedeviga, sed ĉiam altirata de la esenca en tia maniero kiel planedo estas altirata de la suno [1. \ = regas kaj estas rivelata. 2. / = rivelas kaj estas regata]:

Elemento		Elemento	Nivelo
<u>be</u>		<u>a</u>	Vorto
Morfemo		Morfemo	Konstruo
Centro [C]	\	Marĝeno [M]	Strukturo
<u>bela</u>		<u>bebo</u>	Lokucio
Vorto		Vorto	Konstruo
Adjunkto [A]	/	Nukleo [N]	Strukturo

<u>bela bebo</u>		<u>ne silentas</u>	Sentenco
Lokucio		Lokucio	Konstruo
Komplemento [K]	/	Predikato [P]	Strukturo
<u>ne dormante</u>		<u>bela bebo ne silentas</u>	Frazo
Sentenco		Sentenco	Konstruo
Suplemento [S]	/	Bazo [B]	Strukturo

Doni unu nomon al deviga elemento kaj alian al nedevisa elemento sin apogas sole sur la senco de la esprimo, kiu tamen ne devas interferi dum la analizo de la signifantoj. Mi lamentas, ke la sintaksa nomenklaturado de la gramatikoj de Esperanto kaj de aliaj lingvoj estas ege senorda: nomi suplemento elementon, kiu vere kompletigas, estas strange, ĉar suplemento aliĝas al io jam kompleta en sia nescienca senco. Mi scias, ke signo estas arbitra, sed estas pli bone, ke ĉiu nomo helpu la uzanton per senco, kiu portu lin al la sencato.

Cetere, ekde 1967, Eurico Back kaj mi longe hezitis enkonduki po unu nomo por la esencaj funkcioj kaj samtempe po unu nomo por la akcidentaj funkcioj de la kvar ŝtupoj. Estis granda tento ekteni unu solan nomon por la esencaj elementoj de ĉiu el la ŝtupoj [suno] kaj unu solan alian nomon por la akcidentaj elementoj de ĉiu el la ŝtupoj [plano], sed fine detenis nin de tio la devigo distingi ĉiun el la ok diferencaj funkcioj pere de priskriba nivela adjektivo:

Suno morfema [SM]	=	Centro [C]
Plano morfema [PM]	=	Marĝeno [M]
Suno vorta [SV]	=	Nukleo [N]
Plano vorta [PV]	=	Adjunkto [A]
Suno lokucia [SL]	=	Predikato [P]
Plano lokucia [PL]	=	Komplemento [K]
Suno sentenca [SS]	=	Bazo [B]
Plano sentenca [PS]	=	Suplemento [S]

Certe influis nin la portugala lingvo, kies ĉiuj gramatikoj jam uzas duonon de tiuj terminoj: nukleo kaj adjunkto, predikato kaj komplemento. Krome, almenaŭ du el ili estas internaciaj terminoj: predikato kaj komplemento. La kvar aliajn ni devis mem elekti, ĉar neniu gramatiko analizas la unuan kaj kvaran ŝtupojn sub la samaj kondiĉoj, kiujn ni aplikas por unuformigi la analizon de ĉiu el tiuj kvar ŝtupoj kaj tiel pruvi la ekstreman facilecon de la lingvo: lingvo estas ripetigo!

Kiam ni analizas, sufiĉas indiki la funkcion per ĝia komenca litero sub la koncerna formo [nur unu vorto estas analizata]:

ne		dormante		bela		beb		o		ne		silentas
						C	\	M				
A	/	N		A	/	N				A	/	N
P				K			/			P		
S			/	B								
F												

Tion saman mi montras nun per frazo de la Ekzercaro, al kiu mi tamen aldonas signon por la nula vorto [ø], ĉar en lingvo la foresto de signo povas esti signo: la foresto de la signoj de pluralo kaj akuzativo estigas respektive singularon kaj nominativon. Jen ĝia analizo, en kiu la foresto de la nea vorto estigas jesan sentencon [x: prepozicio]:

Ø		promenante		sur		la		strat		o		mi		Ø		falis
								C	\	M						
V	/	V	\			V	/	V				V		V	/	V
				x	/	L										
L				L								L	/	L		
S									/	S						
F																

Se en unu el la ŝtupoj estas pluraj akcidentaj elementoj, ilia distingo povas esti farata per simpla numerado [Ekzercaro]:

la blanka papero		jam		ne kuŝas		sur la tablo
K-1	.	K-2	/	P	\	K-3

En aliaj cirkonstancoj ĉiu el la sinsekvaj funkcioj havos sian propran nomon, sed nun ĉi tie mi donas nur ekzemplon de kelkaj nomoj de elementoj de la sentenco kaj de la lokucio kaj rezervas ĉiujn aliajn por la komencota gramatiko:

la patro		donis		al mi		dolĉan pomon
K subjekta	/	Predikato	\	K atinga	.	K objekta
Sentenco						

leono		estas		forta
K subjekta	/	Predikato	\	K predikativa
Sentenco				

Tio sama ankaŭ validas por la vorto, sed estas multe pli da restriktioj, ĉar la vorto havas nur du nefermitajn poziciojn, kaj la unua el ili povas esti okupata nur per radikoj kaj nenio alia, kiam la proceduro estas nur kohero [Ekzercaro]:

edz		iĝ		i
fluid		iĝ		i
far		iĝ		i
dis		iĝ		i
al		iĝ		i
Marĝeno mencia		Centro		Marĝeno klasa
Vorto				

La analizo fariĝas tre simpla, ĉar la funkcioj de la sentenco kaj tiuj de la lokucio prezentas la samajn nomojn, sed distingiĝas per tio, ke ili estas komplementoj ĉe la sentenco kaj adjunktoj ĉe la lokucio [Ekzercaro por la ne kompletaj frazoj]:

Al la komplemento [K] subjekta respondas adjunkto [A] subjekta:

la infano		serĉis		serĉo		de la infano
K subjekta	/	Predikato	=	Nukleo	\	A subjekta

Al la komplemento [K] objekta respondas adjunkto [A] objekta:

serĉis		sian pupon	=	serĉo		de sia pupo
Predikato	\	K objekta		Nukleo	\	A objekta

Al la komplemento [K] atingas respondas adjunkto [A] atingas:

diris		al la knabino	=	diro		al la knabino
Predikato	\	K atingas		Nukleo	\	A atingas

Al la komplemento [K] predikativa respondas adjunkto [A] predikativa:

[la] patro		estas		sana	=	patro		sana
K subjekta	/	Predikato	\	K predikativa		Nukleo	\	A predikativa

Al la komplemento [K] adverba respondas ordinare adjunkto [A] adjektiva kaj eventuale [A] adverba:

loĝis		longe	=	loĝo		longa
Predikato	\	K adverba		Nukleo	\	A adjektiva

Al la komplemento [K] aluda respondas adjunkto [A] aluda [pri ...]:

parolas		pri leono	=	parolo		pri leono
Predikato	\	K aluda		Nukleo	\	A aluda

Al la komplemento [K] deklara respondas adjunkto [A] deklara [eble]:

kredeble		renversiĝos	=	kredebla		renversiĝo
K deklara	/	Predikato		A deklara	\	Nukleo

Al la komplemento [K] devena respondas adjunkto [A] devena [el ...]:

eliras		el la buŝo	=	eliro		el la buŝo
Predikato	\	K devena		Nukleo	\	A devena

Al la komplemento [K] etenda respondas adjunkto [A] etenda [ankaŭ]:

nur		iri	=	nura		iro
K etenda	/	Predikato		A etenda	\	Nukleo

Al la komplemento [K] instrumenta respondas adjunkto [A] instrumenta [per ...]:

vidas		per la okuloj	=	vido		per la okuloj
Predikato	\	K instrumenta		Nukleo	\	A instrumenta

Al la komplemento [K] kaŭza respondas adjunkto [A] kaŭza [kial]:

morti		pro la patrujo	=	morto		pro la patrujo
Predikato	\	K kaŭza		Nukleo	\	A kaŭza

uzas		por vino	=	uzo		por vino
Predikato	\	K kaŭza		Nukleo	\	A kaŭza

Al la komplemento [K] konverĝa respondas adjunkto [A] konverĝa [kun ≠ de ...]:

edziniĝis		kun sia kuzo	=	edziniĝo		kun sia kuzo
Predikato	\	K konverĝa		Nukleo	\	A konverĝa

Ni observu: eksedziĝi de sia kuzo...

Al la komplemento [K] loka respondas adjunkto [A] loka [kie]:

kuŝas		sur la tablo	=	kuŝo		sur la tablo
Predikato	\	K loka		Nukleo	\	A loka

iras		al la onklo	=	iro		al la onklo
Predikato	/	K loka		Nukleo	\	A loka

Al la komplemento [K] mezura respondas adjunkto [A] mezura [kun ≠ sen ...]:

kun bruo		malfermis	=	malfermo		kun bruo
K mezura	/	Predikato		Nukleo	\	A mezura

kostas		naŭ frankojn	=	kosto		de naŭ frankoj
Predikato	\	K mezura		Nukleo	\	A mezura

Ni observu: sen bruo malfermis...

Al la komplemento [K] ofteca respondas adjunkto [A] ofteca [neniam]:

postulas		ĉiam	=	postulo		ĉiama
Predikato	\	K tempa		Nukleo	\	A ofteca

Al la komplemento [K] tempa respondas adjunkto [A] tempa [kiam]:

kreis		en la sesa tago	=	kreo		en la sesa tago
Predikato	\	K tempa		Nukleo	\	A tempa

Al la komplemento [K] traira respondas adjunkto [A] traira [tra ...]:

trakuris		tra la malluma ĉielo	=	trakuro		tra la malluma ĉielo
Predikato	\	K traira		Nukleo	\	A traira

Mi devas antaŭdiri, ke mia semantika teorio pli facile analizas la fakton, dum la gramatiko sin montras pli komplika, ĉar ĝi ne analizas la fakton, sed nur la signifantojn de la fakto, kaj kio decidas, tio estas la sinsekvaj elementoj eblaj en ĉiu el la ŝtupoj. Ĝuste pro tio, kaŭzo plus celo kaj loko plus almovado estas po unu sola komplemento el gramatika vidpunkto, verŝajne pro tio, ke kaŭzo kaj almovado implicas respektive efikon

kaj lokon, sed ne inverse. Kiam ili aperas duope, unu el ili apartenas al la sentenco kiel komplemento kaj la alia apartenas al la frazo kiel suplemento:

pro la pluvo	li	ne venas	por la leciono
	K subjekta	Predikato	K kaŭza
en sia lando	li	iras	al multaj urboj
	K subjekta	Predikato	K loka
Suplemento	Bazo		
Frazo			

La supra malegala aparteneco produktas specialajn sencojn: la komplemento estas simpla estiga detalo de la fakto, sed suplemento estigas subfakton de la fakto. Tio fariĝas klara ĉe la supraj ekzemploj, en kiuj la pluvo kaj la enlandeco estas respektivaj kondiĉoj de la neveno kaj de la iro:

Se pluvas, li ne venas... [inferenco: sed jes pro aliaj kaŭzoj].  
 Se li estas en sia lando, li iras... [inferenco: sed ne en alia lando].

Kiam tiuj cirkonstancoj estas interŝanĝataj, la senco persistas egala, sed la inferenco malsamas. Mia kuraĝa geleganto bonvolu atenti, ke inferenco ĉiam estas kontraŭa deklaro: al nea deklaro respondas jesa inferenco kaj al jesa deklaro nea inferenco. Sekve de tio, la jesa inferenco estas ordinare ignorata pro siaj multaj interpretoj [... sed jes pro aliaj kaŭzoj: ĉi-okaze: sento pri devo, propra intereso, bezono de diplomo, agrabla kompanio ...], dum la nea estas atentata por sia unika interpreto [... sed ne en aliaj lando].

### SAMORDIGO

Kunordigo [signo: +] kaj alordigo [signo: =] estas ripeto de samaj formoj en la sama nivelo, sen ia aliro al pli alta [dua, kvina kaj sesa ekzemploj de la Ekzercaro]:

en	kaj	ekster		land[o]		e
				V		
x	+	x				
X			/	L		
L						
M.				\	M	
V						

homaron		vi		kreis		perfekte	kaj	bele
						V	+	V
V		V		V		V		
L	.	L	/	L	\	L		
S								

homaron		vi		kreis		tre		perfekte	kaj	tre		bele
V		V		V		V		V		V		V
						L			+	L		
L	.	L	/	L	\	L						

S
---

ludoviko		mia		filo
V		V	/	V
L	=	L		
L				

nun		mi legas	Ø	vi legas	kaj	li legas
		S	+	S	+	S
S	/	S				
F						

kiam mi venis al li		li dormis	sed	mi lin vekis
S	/	S		S
F			+	F
F				


Kaj ni vidas, ke kunordigo aperas en ĉiu el la niveloj: supre estas morfemo kaj morfemo, kiu fariĝas morfemo, vorto plus vorto, kiu fariĝas vorto, lokucio plus lokucio, kiu fariĝas lokucio, sentenco plus sentenco, kiu fariĝas sentenco, kaj fine frazo plus frazo, kiuj fariĝas frazo.

Alordigo aperas supre en la nivelo de la lokucio, sed nur ĉe la nivelo de la morfemo ĝi ne okazas. Mi ekzemplas per fama frazo en la fino de romano de Machado de Assis (1859-1908), kiun multaj el liaj biografoj diras konfeso pri li mem, senfila homo:

mi ne havis infanon		mi transdonis al neniuj la heredon de miaj mizeroj
F	=	F

## VERTIKALA PROCEDURO

Dum la horizontala proceduro laboras ene de la sama nivelo, kaj iliaj reguloj pri kohero kaj samordigo (kunordigo kaj alordigo) estas la samaj en ĉiu el la kvin niveloj inter morfemo kaj frazo, la vertikala proceduro implicas la ŝanĝon de la nivelo. Per superordigo esprimo de malalta nivelo iras al pli alta, kaj per subordigo esprimo iras de alta nivelo al malalta. La unua iras supren kaj la dua malsupren:



Superordigo kaj subordigo estas similaj, sed kontraŭsencumaj proceduroj, kvankam ambaŭ dependas de la proceduro de kohero. Ni devas akcepti, ke ĉi tiuj du procedoj ne estas nur lingvaj, sed ankaŭ sociaj, kvankam konataj sub aliaj nomoj: promocio kaj degrado. Efektive, se soldato fariĝas kaporalo, li estas superordigata, nome promociata, kaj se kaporalo fariĝas soldato, li estas subordigata, nome degradata... Subordigo tamen ne havas la misfamon de la degrado. Sed ke okazas malaltigo, tio ja okazas!...

Kaj mi insistas, ke la supra diagramo resumas la precipajn strukturajn rimedojn de la lingvoj, sed precipe la sintakso de la vorto!

Sekve de tio, la klarigoj de la Plena Analiza Gramatiko de Esperanto, de Kalocsay-Waringhien, estas nura provo bapti per nomoj tion, kion la supra diagramo simpligas kaj etendas al la diversaj niveloj de la lingvo. Rekta vortefiko, inversa vortefiko, kuntenaj kaj disfalaj elementoj estas horizontalaj proceduroj, kiuj nur komplikas la solan rimedon de la lingvo, kiu estas vertikala transporto supren kaj malsupren..

### SUPERORDIGA PROCEDURO

La superordigo estas pli simpla ol la subordigo, ĉar malgranda formo iras al la spaco de pli granda: nenio markas tiun proceduron, kiu tamen estas nete distingebla per la manko de aliaj sinsekvaj formoj en la sama nivelo kaj eventuale per la prozodio kutima de la ŝtupo, al kiu alvenas la elemento superordigita [Ekzercaro]:

Vorto povas superordiĝi al sentenco:

jes		patrino
V		V
L		L
S	\	S
F		

Vorto povas superordiĝi al frazo [tildo indikas la prozodion]:

fajro	!
V	
L	
S	
F	~

Lokucio povas superordiĝi al sentenco [punkto markas la prozodion]:

nu		mia		patrino	?
V		V	/	V	
L		L			
S	\	S			
F					~

Lokucio povas superordiĝi al frazo

kia		ĝoja		festo	!
V	.	V	/	V	
L					
S					
F					~

La foresto de la akcidenta ero ne naskas superordigon [Ekzercaro]:

leono		ø		estas		besto
-------	--	---	--	-------	--	-------

mi		ø		vidas		leonon
Vorto		Vorto	/	Vorto		Vorto
Lokucio	/	Lokucio		\		Lokucio
Sentenco						
Frazo						

La supraj frazoj havas nenian superordigon, ĉar ĉiam temas pri la sola esenca elemento. Se tamen akcidenta elemento fariĝas esenca, tio estas superordigo, kiu povas okazi inter la morfemo kaj la sentenco, kaj mi ekzemplas per ambaŭ:

Dis		e
per		i
et		a
Akcidenta Morfemo		
Esenca Morfemo	\	Morfemo
Vorto		

Se	li	scius	...
Akcidenta sentenco			
Esenca sentenco			
F			~

En unu el la antaŭaj paĝoj restis dirite, ke nomoj kaj pronomoj estas substantivoj, sed nun aperas alia distingo inter nomoj kaj pronomoj.

Nomoj kaj adjektivoj povas aperi solaj, sed tio estas nur cirkonstanca, ĉar nomojn ofte akompanas adjektivoj kaj adjektivojn adverboj, kiel ni ekzemplas per la dua sekvanta frazo kun adjektivo en la unua vorto kaj adverbo en la antaŭlasta [Ekzercaro]:

		papero		ø		estas				blanka
La		papero		ø		estas		tre		blanka
V	/	V		V	/	V		V	/	V
L			/	L			\	L		
S										
F										

Tio estas neebla ĉe pronomoj: pronomoj estas devige superordigitaj vortoj, kaj tio estas nesemantika diferenco inter nomoj kaj pronomoj. Ilin tamen akompanas la du triopigaj vortoj, kaj tio pruvas ilian superordigon al lokucio [Ekzercaro]:

Ni ĉiuj kunvenis, por preparoli tre gravan aferon.  
Mi zorgas pri ŝi tiel, kiel mi zorgas pri mi mem

La fakto, ke la du triopigaj vortoj ordinare postas al ili certe dependas de tio, ke plej ofte la pronomoj kondukas kiel senakcentaj vortoj proklizaj al la sekvanta akcentita.

## SUBORDIGA PROCEDURO

La subordigo povas esti rekta subordigo, kiu havas nenion por indiki tiun fenomenon krom la manko de la regula prozodio, kaj nereakta, kiu estas anoncata per specialaj komencaj vortoj, kies funkciojn mi nomas subigiloj.

### Rekta subordigo

Mi opinias, ke la plej antikvaj subordigoj estis la rektaj, kiuj poste disvolvis tiun proceduron pere de subigiloj.

Certe la proceduro komenciĝis per la subordigo de demando en la pozicio de objekto post verboj de diro kaj scio. Tiaj estas nerektaj demandoj, kies esperantaj verboformoj estas egalaj al la verboformoj de la sendependa demando, diference de la maniero de multaj etnolingvoj [Ekzercaro]:

se vi sciis kiu li estas vi lin pli estimus  
Subfrazo

La subfrazo tie havas la funkcion de substantivo, sekve de lokucio, sed la tuta frazo povus havi la saman sencon sub alia formo sen ia subordigo:

Kiu li estas? Sciante tion, vi lin pli estimus.

Poste tiu facila rimedo etendiĝis de la nerektaj demandoj al nedemandaj okazoj [Ekzercaro]:

ŝi prenis la plej belan arĝentan vazon	kiu estis en la loĝejo
	Subfrazo

Nun la subfrazo fariĝis simpla adjektivo, kiu implicas kaj la demandon kaj ĝian respondon:

- Kiu [vazo] estis en la loĝejo?
- Bela arĝenta vazo.

Ŝajnas al mi, ke du reguloj permesas kaj regas ne nur tiajn subordigojn, sed multajn aliajn okazojn lingvajn:

1. Se estas absurda interpreto, ni devas serĉi alian eblan ne absurdan kuntekston ĉar absurda frazo ne portus al la unua demandanto tion, kion li deziras de la dua [Ekzercaro],:

La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro [...].

Ĉar neniu povas esti la plena portreto de iu alia, tiu *plena portreto* devas konduki nin al alia interpreto: ege simila!

Kaj estas egale absurde pensi, ke la demanda montra vorto indikas ĉi tie demandon, kaj ni do devas iri al alia senco, nome demando, kiu sencas nur la propran respondon, kaj ne alian:

- Kiu estis la plena portreto de sia patro [...].?
- La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro [...].

2. Se estas io ripetita en la frazo, ĉu per sencoj, ĉu per vortoj, ordinare intervenas elizio por forigi la ripetajon:

- Kiu filino estis la plena portreto de sia patro [...]?
  - La pli juna filino, kiu *filino* estis la plena portreto de sia patro [...].

La tuta demanda frazo fariĝas nun per subordigo simpla adjektiva lokucio en alia sendependa frazo, kaj la plej ofte ĉe la dua okazo la vorto prenas nulan varianton:

la pli juna filino kIU estis la plena portreto de sia patro [...].  
 Nomo Adjektivo

La elizio ne estas deviga, ĉar ĝi havas sufiĉe bonan analizon, sed ĝiaj ĉeestoj estas tre maloftaj kaj implicas gravan emfazon, kiun la kunteksto devas pravigi:

la pli juna filino kIU filino estis la plena portreto de sia patro [...].  
 Nomo Alordigo

Lamentinda mistrakto de la ordinara gramatiko vidiĝas en la subklaso de relativaj pronomoj, kiuj absolute ne ekzistas, ĉar ili estas nur la demandaj en subordiga situacio, kiel aperas en la supra demonstro.

Kaj ĝuste pro tio la lingvistoj povis malkovri unu el la lingvaj universaloj: se estas relativaj pronomoj, tiam estas demandaj pronomoj...

Verŝajne la nescio de tio, kio estas la vera subordigo, blindigis ilin por la fakto, ke lokucio de objekto kaj sentenco de objekto estas ĉiam interŝanĝeblaj elementoj, havas la saman funkcion kaj do diferenciĝas nur per la interna konsisto, sed ne per sia dependeco al la ilin permesanta predikato.

Temas pri simpla konfuzo inter kio estas kohero [io horizontala] kaj kio estas subordigo [io vertikala].

Aligaj prepozicioj donas al ni ekzemplojn pri rektaj subordigoj de lokucioj, kaj mi prenas frazon jam cititan:

eliras		el		la		buŝo		eliro		el		la		buŝo
V				V		V						V		V
		x		L						x		L		
L		L								L				
S								V		V				
F								L						

La duobla supra analizo pruvas, ke la dekstra lokucio kaj la maldekstra frazo esprimas la saman sencon kun la sola restriktio de la sintaksa diferenco inter lokucio kaj frazo.

Sentenco subordiĝas rekte, kiam temas pri la infinitiva formo de verbo, ordinare al lokucio kaj al vorto:

Resti		kun		leono		Estas		dangere
V				V		V		V
		x		L				
L		L						

S				
L		L		L

En Esperanto tamen plej ofta estas la rekta subordigo de ĉiu ŝtupo al la nivelo de la morfemo, sed tio okazas pro la feliĉa ideo, kiun havis Zamenhof: marki la ĉefajn gramatikajn klasojn per unusola vokala morfemo. Sekve de tio ĝi estas ordinara proceduro:

Subordigo:							
vorta		form		o		a	Forma
		form		o		i	formi
		form		o		e	forme
		util		a		o	utilo
		util		a		i	utili
		instru		i		o	instruo
		instru		i		a	instrua
		M		M			
		V					
		M				M	
		V					

lokucia		granda		animo		a	Grandanima
		granda		anim		e	grandanime
				o			
		V		V			
		L					
		M				M	
		V					

sentenca		sin		doni		a	Sindona
		L		L			
		S					
		M				M	
		V					

fraza		oni		diras		o	Onidiro
		L		L			
		S					
		F					
		M					
		V					

Ni ne forgesu, ke gramatika morfemo devige falas antaŭ alia vokala morfemo, kaj tio klarigas la lastan rezulton de la sekvanta subordigo:

oni		diras		o	onidiro
-----	--	-------	--	---	---------

Estas tamen unu escepto, kaj nur por pruvi, ke Esperanto finfine estas natura lingvo [Zamenhof]:

viv		u		o	vivuo
-----	--	---	--	---	-------

### Nerekta subordigo

La nerekta subordigo havas enkondukan vorton, kiu estas metalingva signo, kaj ĝia senco estas do nur io lingva sen ia rilato al la eksterlingva mondo. Ili estas farataj per ses subjunkcioj en la funkcio de subigiloj, ordinare subordigitaj al sentenco kaj rarisime al lokucio kaj vorto [Ekzercaro por la tri unuaj]:

se apenaŭ dum kvaza ŭ ĉar ke		mi estus sana ŝia patrino ŝin rimarkis ŝi parolis tondrus, vi vokas vi venos		mi estus feliĉa ŝi kriis al ŝi elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj li krias mi venas mi ne dubas
		S		
		F		
x		S		
S			S	
F				

Ofta tamen estas la subordigo de lokucio al vorto, kun ŝanĝo de komplemento al adjunkto [Ekzercaro por la frazoj]:

Al la komplemento [K] subjekta respondas adjunkto [A] subjekta:

la		infano		serĉis		serĉo		de la infano
V		V		V				L
L				L		V		V
S						L		

=

Al la komplemento [K] objekta respondas adjunkto [A] objekta:

serĉis		sian		pupon		serĉo		de sia pupo
V		V		V				L
L				L		V		V
S						L		

=

La senco de la sentenco kaj tiu de la lokucio estas la samaj, sed evidente ne iliaj gramatikaj valoroj: ili estas kvazaŭ du vazoj, kiuj staras sur aliaj ŝtupoj en montrujo.

Lingvo estas esence homa interago, kiu nomiĝas dialogo: la unua dialoganto produktas kaj sendas, dum la dua dialoganto ricevas kaj reproduktas.

### LABORO DE LA UNUA DIALOGANTO

La laboro de la unua dialoganto estas lingva sintezo.

Pluraj estas la diferencoj inter la lingvo, kiu komenciĝas en la menso [mensolingvo], kaj la lingvo, kiu aperas sur la lipoj [lipolingvo], kvankam ambaŭ estas farataj ene de la cerbo. La mensolingvo sin tenas sufiĉe la sama ekde kiam primato saltis de arbo por piediri, ĉar la pensanto havas fulman aliron al la globa fakto memorata, sensata aŭ imagata pere de sia propra cerbo kaj ĝin dissekcas por sendi al alia: ĝi vidas ĝin kun la klareco de vekita sonĝo. La evoluo de la mensolingvo tamen kondiĉas la evoluon de la individuo kaj de lia komunumo: la bestoj kaj iliaj komunumoj ne evoluas, ĉar iliaj interaparatoj haltas ĉe la konstruoj kaj ne avancis al la strukturoj pro manko de artikulado, kiu ligas eron al ero por formi aron. La lipolingvo starigas la pensanton antaŭ alia pensanto, kiu ne havas aliron al la cerbo de la unua, kaj tio trudas al la unua dialoganto unue simpligon por tempoŝparo kaj poste aldonajn rimedojn por facila komprenigo.

La mensolingvo estas la sama por la tuta homaro, ĉar ĝi similas skeleton, kiu ne facile distingiĝas de alia, se samgrandaj. Mi supozas, ke ĝi sin apogas sur la ideo, ke la fakto devas esti transportata al la dua: teorio pri semantika transporto.

Ĝi havas la sekvantajn karakterizojn:

1. La menso rigardas fakton, kiun ĝi vidas tuta en interna filmo, kaj nomas ĝin per muta prasigno: nek substantivo nek verbo, sed simple faktosigno. Ĝi estas la unua prasigno, kiun la postaj lipolingvoj povas interpreti jen kiel verbon, jen kiel substantivon, eventuale kiel nur unu el ili. La fakto estas muta respondo al muta demando, ĉar la sama cerbo demandas kaj respondas, por ekzemplo:

- Pri kio temas?

- Pri iri!

La cerbo povus prononci vorton, sed ne okazas prononco, sed rigardo kaj vidigo. Tia muta, sed vidata respondo naskas la unuan prasignon, ĉar ĝi estas bildo kun ĉiuj ĝiaj elementoj: la cerbo realigas la fakton.

2. Identiginte la fakton, la menso iras al ĝiaj faktoj, kiuj estas bilderoj, kaj ilin rekonas kaj dismetas per analogio al efektivigata dialogo, en kiu necese aperas la origino [O de la fakto], kiu estas la diranto, la destino [D de la fakto], kiu estas la aŭdanto, la kargo [K de la fakto], kiu estas la sonaro portata ekde la origino ĝis la destino, kaj fine la vojo [V de la fakto], kiu estas la distanco inter la origino kaj la destino, kiun la kargo devas trairi.

Mi sentas min devigata klarigi, kial mi elektis la vorton *destino* kaj ne la vorton *celo*: simple pro la plursenceco de la dua! Efektive, tiu dua vorto havas sencojn ne akordigeblajn inter si: 1. mi atingas la celon per sago [sago iras: portugallingve, *alvo*]. 2. la celo de mia vojaĝo estas la profito [mi iras pro profito: portugallingve, *objetivo*]. 3. la celo de mia vojaĝo estas Madrido [mi iras al Madrido: portugallingve, *destino*]. 4. la celo de Esperanto estas la faciligo de la internacia komunikado [Esperanto batalas por tia faciligo: portugallingve, *finalidade*]. Argumento por tiaj pluraj sencoj estas la neebleco de ilia adicio, kiu produktus laŭ mi neakceptindan frazon, kiu ŝajnas ne veniala, sed mortinda peko: bona kunulo por la vorto *zono*. Ĝin tia malsupre markas asterisko:

\*La celo de mia vojaĝo estas la profito kaj Madrido.

Alian favoran argumenton donas al mi la Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto en sia tria sencero sub la kapvorto *destino*, precipe ĉar la destino de la kargo estas la plej difinita celo de ĝia posedanto:

3. Difinita celo, uzo de objekto [...].

Inter la fakto kaj ĉiu ĝia faktero efektiviga rilato de demaldekstra dependeco: 1. se estas fakto, estas origino. 2. se estas fakto, estas destino. 3. se estas fakto, estas kargo. 4. se estas fakto, estas vojo.

La respondo al tio, pri kio temas, tuj kondukas al la fakteroj de la respektiva situacio:

Se estas iro, kargo iras: familio [iri / kargo].

Se estas iro, kargo iras de ia origino: Kuritibo [iri / origino].

Se estas iro, kargo iras al ia destino: Londrino [iri / destino].

Se estas iro, kargo iras tra ia vojo: strato [iri / vojo].

La cerbo vidas okazantajn scenojn:

iri kargo [de] Kuritibo [al] Londrino [tra] vojo

Tiuj kvar fakteroj estas nomataj instancoj, ĉar ilia grupo konsistigas la fakton, kiu estas supervorto kaj implicas hiperonimojn de la kargo, de la origino, de la destino kaj de la vojo, ĉar en la fakto *iri* nestas implicita kvaropo: 1. io. 2. de ie. 3. al ie. 4. tra ie. Ĉiu klasero estas subvorto koncerne sian supervorton. La kvar kondiĉaj supraj linioj pravas al ni, ke la instancoj de origino, destino kaj vojo rilatas al la kargo: origino de la kargo, destino de la kargo kaj vojo de la kargo: origino, destino kaj vojo ekzistas nur pro tio, ke kargo ekzistas... Evidente haltinta kargo restas unue en la origino kaj poste en la destino!

Por ne atendi estontan kritikon, mi jam nun avertas, ke estas natura kontraŭdiro inter la semantika kaj la gramatika analizo:

fakto / fakteroj [se estas fakto, estas fakteroj: ne inverse]

verbo \ komplementoj [se estas komplementoj, estas verbo: ne inverse]

La diferenco estas ŝuldata al tio, ke la fakto ĉiam havas ĉiujn siajn instancojn, sed la verbo povas havi neniun komplementon aŭ plurajn. Sekve, la fakto implicas la fakterojn, dum la komplementoj implicas la verbon.

La fakto kapablas akumuli fakterojn, malsupre inter parentezoj, kaj ĝuste pro tio la semantika analizo estas utila instrumento por ĉiu vortaristo. La instancoj estas markataj per la respondaj majuskulaj literoj kaj aperas inter rondaj krampoj, se akumulitaj:

tondras				
F(KODV)				
venas [F]	bruo [K]	de la nuboj [O]	al la grundo [D]	tra la ĉielo [V]

Kontraŭe, la gramatiko analizas nur la formojn, sed ne ĝiajn sencojn, kaj do aperas verboj kun devigaj komplementoj kaj verboj sen devigaj komplementoj, kio estas la okazo de la jena ekzemplo [P – predikato]:

tondras

P

3. Diferencaj de la instancoj, la cirkonstancoj de origino, destino, kargo kaj vojo rilatas sole nur al la fakto, kaj estas markataj per minusklaj literoj: origino de la fakto [o de la fakto], destino de la fakto [d de la fakto], kargo de la fakto [k de la fakto] kaj vojo de la fakto [v de la fakto]. Ankaŭ ĉi tie inter la fakto kaj ĉiu ĝia faktero efektivigatas rilato de demaldekstra dependeco: 1. Se estas fakto, estas origina cirkonstanco. 2. Se estas fakto, estas destina cirkonstanco. 3. Se estas fakto, estas karga cirkonstanco. 4. Se estas fakto, estas voja cirkonstanco.

La distingo inter instancoj kaj cirkonstancoj klarigas la uzon de la nominativo de loko kaj de la akuzativo de almovo ĉe tiuj prepozicioj, kies ordinara senco estas loko kaj ne almovo. La decido estas tre simpla, ĉar ĝi dependas de la senco ene de mia teorio pri transporto:

Loka prepozicio kun nominativo indikas la lokon de la fakto [Ekzercaro]:

La birdo flugas en la ĉambro.

K F v

La nominativo estas postulata, ĉar la ĉambro estas la loko de la flugo, kaj nur nerekte ĝi estas la loko de la birdoj, kaj tio post dedukto: se birdo flugas en la ĉambro, li [tiu mia birdo estas masklo...] estas en la ĉambro.

Loka prepozicio kun akuzativo indikas la postan lokon de la kargo [Ekzercaro]:

La birdo flugas en la ĉambron.

K F D

La akuzativo estas postulata, ĉar nun la ĉambro ne estas la loko de la flugo, sed la posta loko de la birdo.

El tio venas simpla regulo por tiuj lokaj prepozicioj: 1. se temas pri la loko de la fakto, estas deviga la nominativo. 2. se ne temas pri la loko de la fakto, estas deviga la akuzativo.

Estas tamen pli prudente uzi akuzativon nur tiam, kiam ĝia senco estas nete diferenca de tiu de la responda nominativo. Kaj mi lasas la demandon, kiu estas la diferenco inter la du lastaj komplementoj de la sekvanta frazo:

Li dividas la kukon en du partojn.

Li dividas la kukon en du partoj.

4. Instancoj kaj cirkonstancoj povas esti lokaj, tempaj kaj nek lokaj nek tempaj. Instancoj estas facile identigataj: 1. Kargo estas io, kio sin movas al alia loko, al alia tempo aŭ al io alia. 2. Origino estas loko, tempo aŭ io alia, kiun la kargo forlasas. 3. Destino estas loko, tempo aŭ io alia, kiun la kargo aliras. 4. Vojo estas loko, tempo aŭ io alia, tra kiu la kargo sin movas. Cirkonstancoj ofte dependas de metaforoj per ia sameco al la respektivaj instancoj: 1. Kompanio kaj maniero estas cirkonstancoj de kargo, ĉar ili akompanas la disvolvon de la fakto. 2. Aganto, kaŭzo kaj kondiĉo estas cirkonstancoj de origino, ĉar la fakto ekiras de ili. 3. Celo estas cirkonstanco de destino, ĉar la fakto estas farata en ĝia direkto. 4. Instrumento estas cirkonstanco de vojo, ĉar la fakto okazas per ili. Ekzemplo klarigas la metaforecon de la cirkonstancoj:

Homo venas kun amiko [homo kaj amiko venas kune].  
 Homo venas kun ĝojo [homo kaj ĝojo venas kune].  
 Homo venas de amiko.  
 Morto venas de preteratento sur la strato.

Sur unu el la postaj paĝoj aperos longa frazo kun ĉiuj instancoj kaj kun la dek du cirkonstancoj, kiujn Eurico Back kaj mi malkovris en la gramatiko de la portugala lingvo kaj verŝajne ankaŭ en tiu de Esperanto. Tiuj cirkonstancoj tamen apartenas al la gramatiko, ne al semantiko. La semantiko havas malpli da restriktioj, kaj estas eble pensi pri kargo, origino, destino kaj vojo de loko, de tempo, de stato kaj de io alia...

5. La sinsekvo de la prasignoj de fakto, instancoj kaj cirkonstancoj dependas de la realaĵo, sen ia alia indiko de funkcio: fakto, kargo, origino, vojo kaj destino, unue la instancoj kaj poste la cirkonstancoj pri loko, pri tempo kaj pri nek loko nek tempo.

La mensolingvo tamen havas mutajn prasignojn, kaj ĝia ekapero konsumas minimuman tempon kaj devas ŝajni subita, kaj tio estas evidenta pro la certeco, ke la fakto jam implicas subvorton por ĉiuj elektitaj instancoj kaj cirkonstancoj. Sekve de tio la fakto ripetiĝas ĉe ĉiu instanco kaj ĉe ĉiu cirkonstanco. La mensolingvo laboras super duopoj, kiuj havas la rigidan sinsekvon de esenca kaj akcidenta laŭ la marŝo de la elektoj de instancoj kaj cirkonstancoj [la punkto indikas kunrilaton]:

(iri / familio) . (iri / domo) . (iri / klubo) . (iri / strato) .  
 F K F O F D F V  
 (iri / rapideco) . (iri / invito) . (iri / manĝo) . (iri / veturilo)  
 F k F o F d F v

6. La mensolingvo estas bildo kun bilderoj: mankas al ili priskriboj, ĉar la cerbo rigardas kaj vidas, kaj pro tio sama ili ne bezonas internajn prasignojn, kiuj havus signifaton nur ene de la propra lingvo.

7. Ĉar la mensolingvo apogas sin sur bildoj kaj bilderoj, povas okazi, ke aperas trompiĝoj, sed ne ambiguaĵoj.

8. La mensolingvo estas ebena: nenia elemento elstaras super alia!

Mi diris kaj nun rediras, ke ĉio lingva devas validi por ĉiuj partoj de la lingvo, kaj super la frazo estas la grava nivelo de la dialogo, en kiu la unua dialoganto proponas peton [P] kaj la dua dialoganto revenas al la unua per respondo [R], kiu povas esti ĉu akordo por favore fini la dialogon, ĉu rifuzo por malfavore interrompi la dialogon kaj ĝeni la postajn [Ekzercaro]:

- Nu, mia filino?  
 Peto  
 - Jes, patrino.  
 Respondo

La peto ordinare kaj la respondo malofte povas esti granda kvanto da frazoj gramatike sendependaj unuj de la aliaj, sed semantike analizataj per la tri ĉefaj instancoj de transporto. Ilia aro produktas mesaĝon, kiu ĉiam estas peto aŭ respondo:

1. La origino, nomata Prologo.

2. La kargo, nomata Nodo.
3. La destino, nomata Epilogo.

La tuto estas strukturo, kaj do nur la nodo povas resti sola:

Prologo		Nodo		Epilogo
Akcidenta	/	Esenca	\	Akcidenta
Teksto				

Ĉiu el tiuj tri partoj de teksto povas sinsekve esti dividataj en novaj triopoj kun prologo, nodo kaj epilogo, kaj tio permesas milpaĝajn romanojn pere de tiaj subordigoj. Mi ekzemplos per la poemo *La Malsana Infano*, verkita de la brazila poeto Manuel Bandeira (1886-1968), en mia traduko [la alineoj markas po nova strofo]. Tie prologo, nodo kaj epilogo subordiĝas al prologo:

Prologo	Prologo	La infano dormas.	O menino dorme.
	Nodo	Por trankvila dormo Panjo plue kantas, Ĉeflanke sidanta De l' infano sia:  – Dolorĉjo, foriru! Lasu mian filĉjon! Dormu, mia amo! Dormu... dormu... mi...	Para que o menino Durma sossegado Sentada a seu lado A mãezinha canta:  - Dodói, vai-te embora! Deixa o meu filhinho! Dorme, meu amor! Dorme... dorme... meu...
	Epilogo	Pro mortiga laco Endormiĝis ŝi.	Morta de fadiga, Ela adormeceu.
Nodo		Nun, al ŝultro ŝia Figuro de sankta, En sama kantiko En sama son' ŝia, Klinas sin kaj kantas:  – Dormu, mia amo! – Dormu, mia kara!	Então no ombro dela Um vulto de santa Na mesma cantiga Na mesma voz dela Se debruça e canta:  - Dorme, meu amor! - Dorme, meu benzinho!
-Epilogo		Kaj l' infano dormas.	E o menino dorme.

La poemeto estas peto, kiun la verkinto sendas al siaj estontaj legantoj. Nu, kiu petas, pagas: la pago estas la beleco de liaj versoj... kaj de lia glorigo de la patrineco.

Mi nun digresias, fidante la bonkorecon de miaj gelegantoj.

Ĉar la dialogo estas efika rimedo por la homaj necesajoj, prudenta studento ĉiel insistas por akiri al si la akordon de siaj kolegoj, kaj do uzas la tri paŝojn de la mesaĝo. Sekve li diras [prologo]:

- Mi bezonas dek realojn.

Ĉiu el ili akordas pri tio, ke estas lia rajto bezoni monon: silento estas konsento [Proverbaro Esperanta], sekve minimuma postulo de peno... Post tio, li eniras kun sia dua provo [nodo]:

- Kiu el vi havas dek realojn?

Se mankas respondo, tia manko estas nea respondo, kaj ĉio finiĝas... Eble tamen unu el liaj kolegoj respondas per klino de kapo al brusto [se bulgaro per la movo de la kapo de ŝultro al ŝultro] kaj pli verŝajne per la buŝo:

- Mi.

Nur nun tiu sagaca studento fine venas al iom pli pene respondebla demando [epilogo]:

- Ĉu vi povus prunte doni ilin al mi?

La avantaĝo de tia respondo kuŝas en tio, ke ĉiu el la respondoj, jesa aŭ nea, plu tenus bonaj iliajn interrilatojn, ĉar la unua dialoganto petas nur unu el du respondoj: mi povas aŭ mi ne povas... Diferenca estus la sekvanta demando, kies nea respondo trudus simplan rifuzon kaj povus bremsi estontajn interagojn:

- Bonvolu do prunte doni ilin al mi!

Tia demando tamen povus esti farata post la jesa respondo al la antaŭa, ĉar nun la konsento estus certa. Se tiu kvara demando okazus, ĝi estus la nodo, dum la tri unuaj prologo, nodo kaj epilogo fariĝus per subordigo la prologo de la konversacio. Post la konsento pri la pruntedono, venus la epilogo:

- Dankon.

Ni tamen konstatu, ke ĉiu el la tri unuaj demandoj povus rezultigi la finon de la dialogo, ĉar unu el la aliaj studentoj povus tuj konkludi, ke la vera intenco de la deklaro de la studento estus peto de mono, kaj ajna el la tri unuaj demandoj havus por la studentoj la sencon de la kvara. Tio estus fraza metonimio, kiun mi nomas aliro. Ni vidu la sekvantan frazon [Ekzercaro]:

- Donu al la birdoj akvon, ĉar ili volas trinki.

De la uzata imperativo mi povas depreni, ke temas pri ordono de superulo al subulo, sed tiu tuta frazo povus esti reduktata al la pli simpla, kaj la subulo tuj sciis kion fari. La rezulto estus alia ekzemplo de aliro:

- La birdoj volas trinki.

La klasika ekzemplo tamen apartenas al la Nova Testamento ĉe la Evangelio laŭ Sankta Johano en 2,1:

Kaj kiam mankis vino, la patrino de Jesuo diris al li: Ili ne havas vinon.

La Evangeliisto registris la respondon de Jesuo, sed ne la reagon de lia patrino al la vortoj de sia filo:

- Kion, filo mia! Mi petis nenion de vi!...

Kvankam ŝi pravis, ŝia filo komprenis, kion ŝi volas. En ŝiaj vortoj estis do aliro, kiu portis lin al ilia vera senco:

- Faru miraklon!...

Se estas fraza metonimio kaj aliro, certe devas ankaŭ esti fraza sinekdoko kaj retroiro, kiun mi ekzemplas per la sama kunteksto. La superulo vidas la subulon deiri de la birdoj kaj per kritika kuntiro de brovoj demandas lin, kion li faras, al kiuj li respondas:

- La birdoj volis trinki.

Aliro estas dialoga superordigo, dum retroiro estas dialoga subordigo. Kaj mi rediras: lingvo estas ripetiĝo.

Kaj la digresio finiĝas.

La adapto de la mensolingvo al la kulturaj postuloj de ĝia popolo komenciĝas tuj post ol ĝi elektas inter instancoj kaj cirkonstancoj kelkajn el la eblaj dek ses informoj plus la esenca fakto, kiu diskriminacias nenian el la instancoj kaj cirkonstancoj de la dezirata fakto: kvar instancoj, plus kvar lokaj cirkonstancoj, plus kvar tempaj cirkonstancoj, plus kvar nek lokaj nek tempaj cirkonstancoj. Tion li faras per la konsidero de neceso kaj sufiĉo, propono de René de Saussure (1868-1943) por la vortfarado kaj adoptita de la Lingva Komitato, sed efektive tiu kriterio validas kaj valoras ne nur por la vorto, sed ankaŭ por la lokucio, por la sentenco kaj precipe por la frazo.

La instancoj estas ĉiam nur kvar en tri kategorioj kaj ĉiu el ili baras la ĉeeston de la du aliaj: aŭ lokaj, aŭ tempaj, aŭ nek lokaj nek tempaj. Mi do hipotezas, ke la maksimuma longo de lokucio aŭ sentenco lingva estas ne pli ol 17 elementoj. Kaj mi maltimas doni ĉi tie ekzemplon de tioma granda, sed estas evidente, ke la mensolingvo povas ampleksi ĉiujn tiujn elementojn pro sia vekita songokapablo, sed la tro vasta kvanto da detaloj frenezigus la aŭdanton, kiu ne plu memoros la komencon, kiam li atingus la finon...

Nur en tute kaj absolute escepta okazo, estus necese prezenti la sekvantan sentencon kun la fakto, sola en la unua linio, ĉar ĝi implicas ĉiujn aliajn elementojn, kun la instancoj en la dua linio kaj kun la cirkonstancoj lokaj en la tria linio, tempaj en la kvara kaj nek lokaj nek tempaj [nocioj] en la kvina kaj lasta:

<u>iri</u>			
<u>F</u>			
<u>bandito</u>	<u>arbaro</u>	<u>strato</u>	<u>policejo</u>
K	O	V	D
<u>soldato</u>	<u>komandanto</u>	<u>veturilo</u>	<u>policestro</u>
k	o	v	d
<u>lundo</u>	<u>mateno</u>	<u>longa tempo</u>	<u>vespero</u>
k	o	v	d

<u>zorgo</u> k	<u>murdo</u> o	<u>persekuto</u> v	<u>mono</u> d
-------------------	-------------------	-----------------------	------------------

Mi donu la klarigon de la signifo de la supra sentenco: iri bandito el arbaro tra strato al policejo per veturilo far komandanto per soldato tra urbocentro por poliestro lundon de mateno longan tempon al vespero kun zorgo pro murdo post persekuto por mono.

Kiam la mensolingvo donas al la unua dialoganto la filmon de la tuta fakto, komenciĝas la laboroj de la lipolingvo. Ili estas profunde diferencaj: la mensolingvo estas la sama por ĉiuj lingvoj, ĉar la pensokapablo estas ankaŭ la sama, sed la lipolingvo povas esti profunde malegala de unu al alia popolo, de unu al alia kulturo.

Ilia plej grava diferenco kuŝas en tio, ke la mensolingvo estas parataksa: la faktoj sin sekvas unuj post aliaj en la strikta ordo de siaj okaziĝoj, ĉar neniam interligiloj ekzistas inter ili.

Kontraŭe, la lipolingvo estas hipotaksa, ĉar ĝi posedas internajn signojn, kies signifatoj estas io ene de la propra lingvo, sed ne ekster ĝi, kiel la ceteraj lingvaj elementoj. Ili do estas metasignoj, kiel la sekvantaj: 1. la kunordigaj *kaj*, *aŭ* kaj *nek*. 2. la subordigaj *ke* kaj *se*. 3. la etendaj: *ankaŭ*, *ankoraŭ* kaj *nur*.

## LIPOLINGVO

En tiu momento la lipolingvo ekiras al novaj elektoj, kaj havas la sekvantajn karakterizojn:

1. Preskaŭ neniam estos eble, ke diraĵo havu la kvar instancojn kaj la dek du plej oftajn cirkonstancojn, kaj sekve de tio, estos neeble al aŭdanto decidi, kiuj estos la venantaj elementoj, ĉar li ne povas scii, kiujn la parolanto forlasis kun sia konstruktado. Pro tia rompo de la natura sinsekvo de la mensolingvo, la distingo inter sinsekvaj instancoj kaj cirkonstancoj devas esti farata per vorteroj [afiksoj: prefikso, infikso kaj sufikso], per prepozicioj kaj postpozicioj, per la prozodio [frekvenco, intenco kaj daŭro] kaj per la simpla lokigo ene de la sinsekvo.

Ĉar temas nun pri la lipolingvo, lingvo povas havi ĉion supre cititan kaj neniam da ili.

Prepozicioj estas oftaj, ĉar ili estas oportunaj manieroj distingi instancojn kaj cirkonstancojn per siaj sencoj ligitaj al la faktoj:

1. kargo: *krom*, *kun*, *malgraŭ*, *po*, *pri* kaj *sen*.
2. origino: *da*, *de*, *el*, *malgraŭ* kaj *pro*.
3. destino: *al*, *ĝis*, *kontraŭ* kaj *por*.
4. vojo: *antaŭ*, *apud*, *ĉirkaŭ*, *dum*, *ekster*, *en*, *laŭ*, *per*, *post*, *preter*, *sub*, *super*, *sur* kaj *tra*.
5. punkto inter origino kaj destino: *inter*, *je*.
6. transporto: *anstataŭ*, *krom*.

Prepozicioj, en la funkcioj de aligiloj, kiuj indikas lokon en la vojo aŭ tempon kaj aliajn cirkonstancojn de la fakto, prenas akuzativon por indiki la destinon de la kargo.

Ni denove reprenu antaŭan ekzemplon nun iom pli riĉigitan [la punkto indikas kunrilaton]:

(porti / familion)	- sufikso
. (porti / <b>de</b> domo)	- prepozicio
. (porti / <b>al</b> klubo)	- prepozicio
. (porti / <b>tra</b> strato)	- prepozicio
. (porti / <b>kun</b> rapideco)	- prepozicio
. (porti / <b>pro</b> invito)	- prepozicio
. (porti / <b>por</b> manĝo)	- repozicio
. (porti / <b>per</b> veturilo)	- prepozicio
. (porti / <b>post</b> demando)	- prepozicio
. (porti / <b>dum</b> mateno)	- prepozicio
. (porti / <b>en</b> dimanĉo)	- prepozicio

Esperanto ne posedas postpoziciojn.

Prozodio:

En Esperanto prozodio havas minoran ĉeeston, kaj ĝi verŝajne limiĝas al la sekvanaj kutimoj, kiujn mi observis en la naŭ universalaj kongresoj inter 1998 kaj 2006, dum mi havis la honoron esti prezidanto de la Akademio de Esperanto.

Por indiki la intenson mi uzas ĉi tie nur kvar gradojn, kaj mi ĝin markas per **blua** koloro:

- 1 - malpli forta akcento sur la fino de vorto.
- 2 - forta akcento sur la fino de lokucio.
- 3 - pli forta akcento sur la fino de sentenco.
- 4 - plej forta akcento sur la fino de imperativa vorto.

1. Distingo de la limoj inter la ŝtupoj per la intenco de la akcento sur la antaŭlasta silabo, kun la ebleco de ege minora forto sur unusilabaj senemfazaj vortoj [Ekzercaro]:

Mi de[2]ziras al [2]vi [1]bonan [3]tagon, sin[3]joro!  
Ra[4]kontu al [1]mia [1]juna a[2]miko [1]belan histo[3]rion.

Tiaj reguloj devas esti obeataj ankaŭ ĉe kunmetitaj vortoj, sed la unua el du sinsekvaj akcentoj estas malpli forta, vera subakcento:

pa[1]pero  
pa[1]per[1]korbo [kaj ne: [1]paper[1]korbo]

La dua vorto havas subakcenton kaj akcenton, sed estas oftaj du egalaj akcentoj sur ĝiaj unua kaj tria silaboj pro la kutima binara ritmo de Esperanto, sed verŝajne tio ne estas plej bona prononco, ĉar la unua parto de la supra vorto estas la nomo *papero* kun la simpla permesebla elizio de la gramatika finaĵo.

Ĉe longaj frazoj estas ordinara la binara ritmo jamba aŭ trokea, kvankam ne malofte mi jam aŭdis la ternaran [ĵus finiĝinta longa frazo jamba ankaŭ ĝis ĉi tie...]. Unua ekzemplo trokea el la Ekzercaro kaj dua mia jamba [*jambo* estas trokea vorto, kaj *troke'* jamba]:

[4]Diru [1]al la [2]patro, [1]ke mi [2]estas [1]dili[3]genta.  
La [2]homo [1]ne me[1]lanko[3]lias, [1]sed mal[3]sanas.

2. Distingo inter deklara kaj ordona frazoj sen verbo per normala akcento ĉe la respondo al la unua frazo kaj per pli forta akcento ĉe la ordono, kiu distingas la du ripetitajn vortojn ĉisekve [Ekzercaro, por la 2-a kaj 4-a linioj]:

- Kie li estas nun?
- For de tie ĉi.

Mi nun ordonas al vi:  
- For de tie ĉi.

Se nun ni komparas la prononcon de la dua linio kun tiu de la kvara, ni konkludas, ke ili estas diferencaj: la kvara havas prononcon pli energian pro la intenso kaj pli longan pro la daŭro, sekve pro du aspektoj de la prozodio.

3. Distingo inter neŭtrala kaj ekkria frazoj [Ekzercaro, por la 2-a kaj 4-a linioj]:

- Kien li iras?
- Flanken, sinjoro.
- Ĉu mi baras vin?
- Flanken, sinjoro.

La kvara frazo distingiĝas de la dua per sia prononco pli energia pro la intenso kaj pli longa pro la daŭro, sekve pro du aspektoj de la prozodio.

4. La nevasta sencodistinga kampo de la prozodio en Esperanto estis saĝa decido de Zamenhof, ĉar lingvaj prozodioj estas malfacile lernataj ĉe dua lingvo: la plej gravan taskon de la prozodio en Esperanto surogatas la vorto *ĉu*.

Mi tamen opinias, ke la klasoj de la frazoj en Esperanto havas nedistingan, sed ĉiam ĉeestan prozodion, kvankam povas okazi, ke mia portugala prozodio erarigas min.

Por indiki la frekvencon mi uzas ĉi tie nur kvar gradojn, kaj mi ĝin markas per ruĝa koloro:

- 1 - pli basa tono: fino de frazo kun ebleco esti interrompata de alia.
- 2 - basa tono: fino de frazo sen ebleco esti interrompata.
- 3 - mezalta tono, kiu estas la plej ofta por la paroltenado.
- 4 - alta tono, kiu markas la neverban demandon en ĝia komenco kaj la verba en ĝia lasta akcentita silabo.

Mi prezentas neŭtralan senenfazan prononcon, kaj bonvolu observi, ke la markita tono de la parolo persistas ĝis aperas alia marko:

4.1. Nedemandaj frazoj, nome deklaraj kaj ordonaj, en neŭtrala prozodio komenciĝas per la meza tono 3, paŭzas kaj rekomenciĝas per la tono 2, ĉe la unua akcentita silabo revenas al la tono 3 kaj finiĝas per la basa tono 1 [Ekzercaro]:

- [3]Aleksandro ne volas [2]lerni, kaj [3]tial mi batas Ale[1]ksandron.
- [3]Diru al la [2]patro, ke mi [3]estas dili[1]genta.

Se tiaj frazoj komenciĝas per accidenta sentenco, ĝi ekas per la tono 2 kaj supren iras al la 3 en sia lasta akcentita silabo:

[2]Ludo[3]viko, [3]donu al mi [1]panon.

4.2. Verbaj demandoj, kiuj postulas unu el du eblaj respondoj, en neŭtrala prozodio komenciĝas per meza tono 3 kaj finiĝas per la alta tono 4 supren [Ekzercaro]:

[3]Ĉu ne estus al vi agrable havi tian saman ka[4+]pablon?

4.3. Neverbaj demandoj, kiuj postulas unu el multaj respondoj, en neŭtrala prozodio komenciĝas per meza tono 4 malsupren, paŭzas per la tono 2, ĉe la unua akcentita silabo revenas al la tono 4 kaj finiĝas per la basa tono 1 [Ekzercaro]:

[4-]Kial vi ne respondas al [1]mi?

Eventuale, la demanda vorto aperas en nedemanda frazo, ordinare mallongigita, sed ne ĉiam:

[4+]Kial?! Ĉu vi ankoraŭ kuraĝas demandi tion de mi?!...

[3]Kial mi ne respondas al [4+]vi? Ĉu vi ankoraŭ kuraĝas demandi tion de mi?!...

4.4. Ekkriaj kaj ordonaj elementoj havas krom la frekvenco iom pli da daŭro kaj intenso, respektive markataj per vokalripeto kaj grasigo [Ekzercaro]:

[2]Ludo[3]vi[iii]ko, do[ooo]nu al mi [1]panon.

5. distingo per frekvenco inter adicia aŭ alternativa sencoj de unu el la kunigaj vortoj [Ekzercaro]:

Ĉu vi estas surda aŭ muta?

Demando kun tiuj samaj vortoj povas havi du prononcojn, kaj estus bone marki unu el ili per komo ĉe la skribo:

1. la unua estas verba demando en unu sola frazo:

[3]Ĉu vi estas surda aŭ [4+]muta?

Kaj la demando respondus per unu el du eblecoj:

- Jes.

- Ne.

2. la dua estas neverba demando kun du frazoj, sed la dua havas elipisitaj la subjekton kaj la predikaton [la komo estas mia]:

[3]Ĉu vi estas [4]surda, aŭ [1-]muta?

Kaj la demando respondus per unu el du eblecoj:

- Surda.
- Muta.

La Ekzercaro havas du aliajn tiajn demandojn, sed ili vekas nenian dubon, ĉar nur unu el la eblaj respondoj estas verŝajna [la komoj estas miaj]:

Ĉu hodiaŭ estas varme, aŭ malvarme?  
Ĉu li donis al vi jesan respondon, aŭ nean?

Frekvenco, intenso kaj daŭro havas sian taskon por la belsoneco de la parolo kaj multaj stilaj efektoj necesaj al oratoroj.

Kaj finante, mi lasas samtempe la intenson kaj la tonon por pruvi, kiaj bonaj kantistoj ni estas parolante:

[3][2]Ĉu ne [2]estus al [2]vi a[2]grable [2]havi [1]tian [1]saman ka[4+][3]pablon?

Sinsekvo de vortoj:

La dismeto de la vortoj en Esperanto estas ordinaro libera, sed estas privilegiata komuna sinsekvo: 1. subjekto. 2. verbo. 3. objekto. 4. atingo. 5. komplemento devena. 6. komplemento alira. 7. komplemento traيرا. 8. aliaj cirkonstancoj. Maleleganta ekzemplo mia:

[1]Loĝanto [2]transdonas [3]pakon [4]al najbaro [5]de sia terparcelo [6]al lia [7]trans la muro [8]por demonstro de amikeco.

Al la lokigo tamen taskas distingi inter substantivaj subjekto kaj predikativo per ilia dismeto respektive maldekstre kaj dekstre de la verbo, sed objekto kaj objekta predikativo distingiĝas per akuzativo de la unua kaj nominativo de la dua, sekve per kazoj.

Ordinara kutimo portas al la fino de la frazo komplementon, kiu estas pli longa ol atendite:

[...] el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono.  
subjekto

La dismeto estas grava per siaj stilaj efektoj, ĉar la unua kaj lasta lokoj estas insistigaj.

2. La parolanto nun juĝas la instancojn kaj la cirkonstancojn, kaj elektas unu el ili kiel privilegiatan instancon: A – instanco de alesto. Ĝi distingiĝas de ĉiuj aliaj neprivilegiataj instancoj kaj cirkonstancoj ordinaro per la okupo de la unua loko en la sinsekvo, eventuale la lasta, aŭ per alia sona rimedo, kiu estas interna lingvosigno, kiel la sintaksa akordo: tiun privilegiatan instancon la gramatiko nomas subjekto. La eblecoj de la subjekto estas tre vastaj, ĉar la sola restriktio estas tio, ke ĝi devas esti io, kio aperas ene de la fakto, kaj bona ekzemplo aperis dum institucia brazila krizo, kiu atingis la Prezidanton:

La krizo supreniris la ramplon de la Prezidanta Palaco.

Por eviti la retroiron de la leganto ni reprenu nun antaŭan ekzemplon kaj vidu, kiuj privilegiataj instancoj povas aperi, ĉiam akumulitaj al unu el la instancoj aŭ cirkonstancoj, kiun la diranto plej libere elektas:

(iri \ familio) . (iri \ de domo) . (iri \ al klubo) . (iri \ tra strato) (iri \ kun rapideco) . (iri \ pro invito) . (iri \ por manĝo) . (iri \ per veturilo) . (iri \ post demando) . (iri \ dum mateno) . (iri \ en dimano)

Senkolora ebleco aperas per elekto de la kargo kun ŝanĝo de la sinsekvo, ĉar venas al la unua loko la instanco de alesto kun la akumulita instanco inter rondaj krampoj - ĉi-okaze (K):

( <u>familio</u> / iri) ...	[familio iras...]
A(K) F	

Kaj aperas koloraj eblecoj, ĉar la superverbo *iri* cedas sian lokon al pli precizaj faktoj, kiuj ĝin rivelas [se portas, io iras – sed ne inverse]:

( <u>strato</u> / <u>porti</u> ) . (porti \ <u>familio</u> )	[strato portas familion ...]
A(V) F	
( <u>rapideco</u> / <u>porti</u> ) . (porti \ <u>familio</u> )	[rapideco portas familion ...]
A(k) F	
( <u>invito</u> / <u>porti</u> ) . (porti \ <u>familio</u> )	[invito portas familion ...]
A(o) F	
( <u>manĝo</u> / <u>porti</u> ) . (porti \ <u>familio</u> )	[manĝo portas familion ...]
A(d)	
( <u>veturilo</u> / <u>porti</u> ) . (porti \ <u>familio</u> )	[veturilo portas familion ...]
A(v) F	
( <u>peto</u> / <u>porti</u> ) . (porti \ <u>familio</u> )	[peto portas familion ...]
A(v) F	
( <u>mateno</u> / <u>porti</u> ) . (porti \ <u>familio</u> )	[mateno portas familion ...]
A(v) F	
( <u>dimanĉo</u> / <u>porti</u> ) . (porti \ <u>familio</u> )	[dimanĉo portas familion ...]
A(v) F	

Sajnas nun evidente, kial estas neeble difini, kio estas subjekto, ĉar ĝi nepre havas en ĉiu okazo nur unu el la dek ses eblaj sencoj... kvankam mi citis nur naŭ!

Metonimioj kaj sinekdokoj estas la stilistika klarigo por tio, sed la vera klarigo estas la vasta karaktero de la subjekto, kiu estas libere elektata de la diranto por emfazi tion, kion li volas.

La elekto de privilegiata instanco evidente evoluigis la pralingvon, ĉar ĝi devigis ĝin al granda specialigo de la fakto, kiu ricevas vortojn ne ekzistantajn en la mensolingvo, sed nur en la lipolingvo:

(iri \ pomo) . (iri \ de Eva) . (iri \ al Adamo) . (iri \ tra branĉoj)

Se la diranto volas emfazi la gravecon de la virino, li elektas la sekvantan fakton:

(doni \ Eva) . (doni \ pomo) . (doni \ al Adamo) . (doni \ tra branĉoj)

Se la diranto volas emfazi la gravecon de la viro, li elektas duan fakton:

(ricevi \ Adamo) . (ricevi \ pomo) . (ricevi \ de Eva) . (ricevi \ tra branĉoj):

Se la diranto volas emfazi la gravecon de la pomo, li elektas trian fakton:

(pasi \ pomo) . (pasi \ de Eva) . (pasi \ al Adamo) . (pasi \ tra branĉoj)

Se la diranto volas emfazi la gravecon de la branĉoj, li elektas kvaran fakton:

(pasigi \ branĉoj) . (pasigi \ pomo) . (pasigi \ de Eva) . (pasigi \ al Adamo)

Ni observu, ke nur la semantika analizo pruvas, ke ĉiuj frazoj estas sinonimaj, sed kun diferencaj emfazoj, kaj tute ne la gramatika:

Eva donas pomon al Adamo tra branĉoj.  
 Adamo ricevas pomon de Eva tra branĉoj.  
 Pomo pasas de Eva al Adamo tra branĉoj.  
 Branĉoj pasigas pomon de Eva al Adamo.

Kaj nun ni povas adicii la eblecojn:  $9 + 4 = 13...$  Kaj duafoje restas pruvita la neebleco difini la subjekton, kiu nun jam havas dek tri diferencajn valorojn...

Mi teorias, ke en la komenco de la lingva evoluo la sama fakto estis uzata en ĉiu el la kvar variaĵoj, kies sencojn garantiis la prepozicioj aŭ la deviga sinsekvo:

Eva iras pomo al Adamo tra branĉoj.  
 Adamo iras pomo de Eva tra branĉoj.  
 Pomo iras de Eva al Adamo tra branĉoj.  
 Branĉoj iras pomo de Eva al Adamo.

Spuro de tiu tempo restas ĝis nun eĉ en Esperanto:

mi		luas		al li		domon
mi		pruntas		al li		monon
Origino		Fakto		Destino		Kargo

li		luas		de mi		domon
li		pruntas		de mi		monon
Destino		Fakto		Origino		Kargo

Kaj tio vere kredigas, ke antaŭ multegaj miloj da jaroj estis eble uzi trian manieron, se mi bone memoras pri tia antikveco [!]:

domo		luas		de mi		al li
mono		pruntas		de mi		al li
Kargo		Fakto		Origino		Destino

3. La lipolingvo estas arta, ĉar ĝi pentras per adjektivoj kaj adverboj, ludas per metonimio [preno de rivelanta elemento anstataŭ la rivelata: li kuras post ĉiun jupon],

per sinekdoko [preno de rivelata elemento anstataŭ la rivelanta: la varmo ĵus naskiĝis en la horizonto] kaj per metaforoj [preno de tiu el du egalaj rivelataj elementoj, kiu apartenas al la alia rivelanta: ŝia rido estas petaloj disfloriĝantaj]. Evidente, la vido de io bela ne estas arto...

Ni helpu nin per la jam uzita ekzemplo por vidi, kiel adjektivo priskribas:

(porti \ <b>amatan</b> familion)	- adjektivo
. (porti \ de <b>modesta</b> domo)	- adjektivo
. (porti \ al <b>eleganta</b> klubo)	- adjektivo
. (porti \ tra <b>larĝa</b> strato)	- adjektivo
. (porti \ kun <b>granda</b> rapideco)	- adjektivo
. (porti \ pro <b>afabla</b> invito)	- adjektivo
. (porti \ por <b>rafinita</b> manĝo)	- adjektivo
. (porti \ per <b>nova</b> veturilo)	- adjektivo
. (porti \ post <b>delikata</b> demando)	- adjektivo
. (porti \ dum <b>agraba</b> mateno)	- adjektivo
. (porti \ en <b>somera</b> dimanĉo)	- adjektivo

Ankaŭ adverbo priskribas, ĉar adverbo estas la adjektivo de la verbo en tia sama maniero, kiel adjektivo estas la adverbo de la nomo:

(porti \ <b>rapide</b> )	- adverbo
--------------------------	-----------

4. Kiam la tuta penso de la unua dialoganto estas fine preta post la laboro de la lipolingvo, tiam venas la lastaj intervenoj ĝuste en la momento de la ekiro al la lipoj, kaj ili rilatas unue al la fakto.

Li konscias la redundancon de la mensolipo kaj do reduktas al unu sola la ĉeeston de la fakto. Kaj ni turnu nin al nia jam konata ekzemplo kun plej malgranda ŝanĝo de la mensolingvo:

(iri) \ (familio . de la domo . al la klubo . tra strato . kun rapideco . pro invito . por manĝo . per veturilo . post demando . dum mateno . en dimanĉo)

La cerbo konas ĉiujn elementojn de la fakto, sed la menso devas decidi inter la minimuma kaj la maksimuma informo cele al la plej konvena longo koncerne la momenton kaj la alian dialoganton. Krome, li devas decidi, ĉu obei al la tradicia vortosinsekvo de sia lingvo, ĉu adopti alian pro emfaza motivo.

Kaj laste la unua dialoganto sin direktas al la dua per sonoj trans la lipojn kun la celo informi la duan kaj kun la deziro havigi al si lian reagon, kaj por tio uzas la minimumajn necesajn elementojn kondiĉatajn de la okazo:

Invito portas familion al la klubo por manĝo.

Ĉiu alia decido pri elektoj de informeroj implicus alian mesaĝon kaj alian reagon de la dua dialoganto.

5. Pro la jarmila evoluo kaj la arta libereco, la lipolingvo povas esti sufiĉe plursenca. Esperanto tamen estas lingvo, kiu ĝis nun havas la aĝon de bebo, kaj ĝiaj reloj estas tiel bone starigitaj, ke estas antaŭvidataj malmultaj deflankiĝoj de ĝia Fundamento, kiu cetere donas larĝan kampon por evoluo dank'al la restantaj nefermitaj

fenestroj. Efektive, krom la nelatinida tradicio de Esperanto, nenio bremsus inter aliaj la sekvantaj evoluojn, kiuj estas plene neglektataj malpermesoj en la Fundamento:

1. subjekto de infinitivo:

ne estas akvo por la popolo trinki  
Subjekto Predikato

2. absoluta gerundio:

pluvante la rivero superbordiĝas inundante la urbon  
Prologo Nodo Epilogo  
S

6. La lipolingvo estas kolora.

## LABORO DE LA DUA DIALOGANTO

Kaj nun komenciĝas la laboro de la dua dialoganto, kiu estas lingva analizo. La vorto estas la unuo de la lingvo, ĉar ĝi estas la unua kaj la plej malgranda konstrukturo de la lingvo, krom esti la unua lingvero, kiun verŝajne ĉiuj lingvoj posedas. Du reguloj estas gravaj por la reprodukto de la lingvo, sed validas por la dua dialoganto ĉio, kio validis por la unua, ĉar ĉiu dialoganto estas duobla persono:

1. Ĉiu el la elementoj, kiuj sin sekvas, plenumas alian funkcion, havas alian nomon kaj apartenas al alia klaso [A – akcidenta elemento / E – esenca elemento]:

<u>tiuj</u>	<u>miaj</u>	<u>kvar</u>	<u>unuaj</u>	<u>agrablaj</u>	<u>brazilaj</u>	<u>financaj</u>	<u>operacioj</u>
A-1	A-2	A-3	A-4	A-5	A-6	A-7	E

Ili nomiĝas respektive: montra [A-1], poseda [A-2], nombra [A-3], orda [A-4], eca [A-5], propra [A-6], speciga [A-7] kaj noma [E] vortoj.

2. Ĉiu el la elementoj, kiuj sin interŝanĝas, plenumas la saman funkcion, havas la saman nomon kaj apartenas al la sama klaso:

tiuj	iliaj	kvar	bicikloj
iu	viaj	kelkaj	poemoj
kiuj	liaj	pluraj	domoj
<u>neniuj</u>	<u>miaj</u>	<u>multaj</u>	<u>operacioj</u>
	ies	malmultaj	libroj
A-1	A-2	A-3	E

Mi devas averti, ke la supraj reguloj ne estas sole nur lingvaj, sed kulturaj kaj validaj por ĉiaj homaj entreprenoj. Ni pensu nur pri la estraranoj de la Akademio de Esperanto: prezidanto, unua vicprezidanto, dua vicprezidanto kaj sekretario. Laŭ la unua regulo, ĉiu el ili havas alian funkcion, ĉar ili estas sinsekvaj postenuloj. Laŭ la dua regulo, se prezidanto demisias, oni elektas alian akademianon nek por unua vicprezidanto, nek por dua vicprezidanto, nek por sekretario, sed nur por prezidanto.

Se tio estas vera, venas nun granda surprizo:

la	du	homoj
tiuj	kvar_	bicikloj
iuj	kelkaj	poemoj
kiuj	pluraj	domoj
<u>neniuj</u>	<u>multaj</u>	<u>operacioj</u>
A-1	A-3	E

La vortoj super A-1 estas ĉiuj montraj kaj la vortoj super A-2 estas ĉiuj nombraj pro la dua regulo.

Se la unua identiga vorto de la unua kolumno forpuŝas ĉiun alian, ĝi nepre apartenas al la sama klaso: tio, kion la ordinara gramatiko nomas artikolo, estas nura montra vorto, kiu distingiĝas de ĉiu alia per sia senco, sed senco ne estas afero de gramatiko. Estas do nescience nomi iliajn sencojn kaj ne iliajn samajn funkciojn: la etiketoj difinita, nedifinta, relativa vere apartenas al la semantiko, kaj ilia loko estas la vortaro, kiu prezentos iliajn sencojn kaj uzojn.

En la portugala lingvo, la nomataj artikoloj difinita kaj nedifinita estas nepersonaj montraj vortoj, ĉar estas aliaj personaj: este [tiu apud mi] / esse [tiu apud vi] / aquele [tiu for de ni]. Lingvo tamen estas moviĝema sablo: antaŭ iom pli ol kvincent jaroj la portugala montraj estis ses, kun tri neŭtralaj kaj tri insistaj: este / esse / ele / aqueste / aquesse / aquele. Kaj nun estas forta tendenco redukti ilin al duopo per la morto de tiu de la unua persono [este], verŝajne pro ĝia simileco al la dua persono [esse]...

Al la gramatiko taskas nur serioze konstati iliajn klasojn. Se tamen la gramatikistoj volas doni pliajn indikojn, ili devas teni sin sur la kampo de la signifantoj, neniam sur tiu de la signifatoj:

1. Unu el la supraj vortoj de la unua kolumno estas demanda: *kiu*. La ceteraj estas nedemandaj.

2; Unu el ili estas nelibera, nome senescepte postulas la ĉeeston de noma vorto: *la*. La ceteraj estas liberaj, nome ili rilatas al nomaj vortoj, sed povas aperi distancaj de ili.

Se ni iras nun al la dua kolumno, tiu de la nombraj, ni vidas, ke la ordinara gramatiko donas al ili apartajn klasojn: estas nombraj adjektivoj tiuj, kiu indikas difinitan kvanton, dum estas pronomoj tiuj, kiuj indikas nedifinitan kvanton. Tio dependas nur de iliaj sencoj, kaj la gramatiko ne laboras super sencoj. Nenia avantaĝo vidiĝas en tia diferencigo, sed se distingi ilin, tio devas esti farata per nesencaj karakterizoj: *du* kaj *tri* estas adicieblaj nombraj adjektivoj, sed *kelkaj* kaj *pluraj* estas neadicieblaj nombraj adjektivoj... Nombraj frakcioj kaj malfrakcioj estas nomoj, kiuj produktas simplajn adjektivojn: *duono* kaj *duona*, *duoblo* kaj *duobla*, *duopo* kaj *duopa*.

Ĉar la supra alineo parolas pri nombroj, mi petas ĉies permeson por plia digresio: kial uzi la neoficialan vorton *entjero*, se estas la vorto *unuono*, regule farita?

Sekve de ĉio supre dirita, ni havas ĝis nun sep akcidentajn klasojn kaj unu esencan, kiun okupas substantivo.

Se ni iras nun al aliaj eblecoj de tiuj ĝis nun akcidentaj vortoj, ni havos la sekvantan konstaton:

la homoj	estas	tiuj
la bicikloj	estas	miaj
la poemoj	estas	kvar
li	estas	unua

la domoj	estas	agrablaj
la doktoroj	estas	brazilaj
<u>la operacioj</u>	<u>estas</u>	<u>financaj</u>
A-1	E	A-2

Kaj ni devas rekoni, ke nun tiuj samaj akcidentaj vortoj de nia unua diagramo jam ne plu sekvas unu la alian, sed ili sin ja interŝanĝas en la sama loko de la frazo, kaj se nun unu forpuŝas la alian, ĉiu el ili necese apartenas al unu sola sama klaso, kiun ni nomas adjektivo.

Ni do nun devas konscii, ke la klaso de la adjektivoj havas sep apartajn subklasojn: montra [A-1], poseda [A-2], nombra [A-3], orda [A-4], eca [A-5], propriga [A-6], speciga [A-7].

Akcepti substantivajn kaj adjektivajn pronomojn estas nescience, ĉar ĉiu adjektivo havas tian saman konduton, kiun klarigas plej simple la nula varianto de la substantivo... Tion pruvas ekzemploj de la Ekzercaro kun la sama adjektivo jen akompanata de substantivo, jen sola:

La kantado estas agrabla okupo.  
La kanto de la birdoj estas agrabla.

La unua kolumno de la supra diagramo donas al ni du subklasojn de vortoj, ĉar tie aperas la finaĵo *-o* kaj la finaĵo *-i*. La unua el tiuj finaĵoj markas la nomajn vortojn, kaj la dua la pronomajn. Ne temas pri semantika distingo, sed nur gramatika: la pronomaj vortoj havas alian finaĵon, ne akceptas apudan adjektivon, estas vortoj superordigitaj al lokucio kaj apartenas al fermita subklaso. Efektive ili povas esti citataj en sia universo: mi, ci, li, ŝi, ĝi, ni, vi, ili, si, oni. Nomoj kaj pronomoj estas do subklasoj de la substantivo, kaj la unua el ili estas nefermita subklaso.

Estas devo de ĉiu gramatikisto prezenti la tutan liston de la fermitaj klasoj kaj subklasoj kaj nur ekzempli per kelkaj el la nefermitaj klasoj kaj subklasoj.

La supra diagramo donas al ni du aliajn elementojn de la lingvo, kiuj estas la verbo kaj la frazo.

La verbo estas unika lingvoformo, ĉar ĝi estas la sola, kiu estas esenca elemento kun solaj du akcidentaj elementoj de la adverba subklaso de deklaro, kaj neniam povas okazi sen unu el ili:

la bicikloj	ø estas	tiuj
<u>la bicikloj</u>	<u>ne estas</u>	<u>tiuj</u>
A-1	E	A-2

La unua elemento de la verba lokucio estas nula varianto de la simpla plena varianto de la alia klara vorto: *jes*. Ĝi estas kurioza vorto, ĉar ĝi estas la sola, kiu havas du variantojn: ĝi estas mem interjekcio, sed havas nulan varianton por la verba lokucio kaj nenulan varianton por adverba vorto, ĉiam superordigita al lokucio: *ja*.

La nulaj variantoj aperas ordinare, kiam temas pri subklaso aŭ klaso kun solaj du okupantoj: por ekzemploj, adjektivaj kaj substantivaj nombro kaj kazo havas po unu nula elemento por singularo kaj nominativo. Se ili estus plenaj elementoj, tio estigus grandan redundancon, kiun la plej multaj lingvoj abomenas.

Se estas du plenaj elementoj aŭ pli ol du, la manko de unu el ili estas simpla foresto kaj havas nenian sencon: dometo kaj domego estas du domoj, kaj la sama domo povas esti dometo aŭ domego depende de la cirkonstancoj de la parolo.

Kaj nun, ekipita per ĉiuj lingvaj rimedoj, la dua dialoganto analizas la aŭdatan tekston vorto post vorto. Li scias, ke la fina frazo estas listo da vortoj [V], kiuj kunmetas lokuciojn [L], kiuj kunmetas sentencojn [S], kiuj kunmetas frazon [F], kaj ĉiu nivelo de vortoj kun morfemoj, lokucioj kun vortoj, sentencoj kun lokucioj kaj frazo kun sentencoj prezentas sub la samaj reguloj difinitajn interrilatojn, kiujn li povas malkovri. Kvankam la elementoj de ĉiu nivelo havas apartajn nomojn, la kohera regulo estas ĉiam la sama, ne nur de la vorto al la frazo, sed eĉ de la morfemo al la vorto, kiu estas la unuo de la lingvo de tio, ke ĝi estas la unua konstrukturo kaj nia kultura mondo estas konstruata pere de vortoj: la lingvo faras la komunuman mondon pere de siaj vortoj. La listo de la vortoj de ĉiu nova teksto ordinare estas diferenca de ĉiuj antaŭaj kaj postaj, sed substantivoj, adjektivoj kaj verboj havas strukturojn, kiuj estas ege familiaraj al ĉiu parolanto, ĉar ili aperas en ĉiu nova aŭdata frazo.

Verŝajne Esperanto estas la lingvo, kiu donas al siaj lingvanoj plej multajn surprizojn ene de la vorta nivelo, ĉar estas vivaj la morfemoj kaj la eblecoj de subordigo en skalo ne konata en etnolingvo.

Kaj nun frazo kun la marŝo de la sinsekvaj eltrovoj de la analizo de la dua dialoganto [Ekzercaro]:

el		sub		la		kanapo		la		muso		kuris		sub		la		liton
				V <sub>3</sub>	/	V <sub>4</sub>		V <sub>6</sub>	/	V <sub>7</sub>		V <sub>9</sub>				V <sub>12</sub>	/	V <sub>13</sub>
		x <sub>2</sub>	/	L														
x <sub>1</sub>	/	L												x <sub>11</sub>	/	L		
L <sub>5</sub>				.		L <sub>8</sub>		/		L <sub>10</sub>		\		L <sub>14</sub>				
S <sub>15</sub>																		
F <sub>16</sub>																		

La analizo marŝas vorto post vorto kaj kiam la dua dialoganto difinas la unuan lokucion, li jam scias, ke estos aliaj kaj venos senescepte kaj sentenco kaj frazo. La analizo de skribita teksto obeas al la samaj reguloj.

La numerado indikas supre la sinsekvon de la analizo, kiu iras de vorto al lokucio kaj ĉiufoje revenas al vorto kaj lokucio ĝis la lasta lokucio, kaj poste la analizo iras nun de sentenco al sentenco ĝis la lasta, kaj nur tiam finiĝas la analizo per la trovo de la frazo.

La supra analizo montras la subordigon de prepozicia lokucio al senprepozicia lokucio, kaj tio permesas la ĉeeston de dua prepozicio, kiu nun antaŭas la tutan subordigitan lokucion.

Aŭdanto kaj leganto estas kompetentaj dialogantoj, kvankam ordinare la plej multaj el ili scias nenion pri lingvo krom vortoj kaj literoj. Dank' al la dioj la scio de lingvoj havas nenion komunan kun la scio de iliaj gramatikoj: lerni lingvon ne postulas tre multe pli da tempo ol lerni rekte piediri...

Kaj mi finas per alia numerado [Ekzercaro]:

la		domo		en		kiu		oni		lernas		estas		lernejo
[V]		[V]				V <sub>4</sub>		V <sub>6</sub>		V <sub>8</sub>				
				x <sub>3</sub>	/	L								
				L <sub>5</sub>		.		L <sub>7</sub>		.		L <sub>9</sub>		
				S <sub>10</sub>										
				F <sub>11</sub>										
V <sub>1</sub>	/	V <sub>2</sub>		\		V <sub>12</sub>								
L <sub>13</sub>								/		L <sub>14</sub>		\		L <sub>15</sub>

S <sub>16</sub>
F <sub>17</sub>

La du unuaj vortoj aperas inter rektaj krampoj nur pro tio, ke ili estas tuj komprenataj, sed la dua dialoganto devas teni ilin en sia memoro, ĝis li finas la trian vorton, kiu estas demanda frazo subordigita al vorto.

Kaj nun, se mia aminda geleganto eltenis ĝis ĉi tie mian longan paroladon, ci bonvolu atendi la venontan jaron por legi mian Gramatikon Modernan de Esperanto.

Kun mia plej kora danko!

Komencita en 2007.09.07

Finita en 2007.09.26

Fino de la prilaborado en 2007.10.20